6-a Jaro. N-o 273 APERAS SEMAJNE 26. Decembro 1929



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerhner

PRI NEGRAJ LINGVOJ KAJ LITERATURO

Ordinare oni kredas, ke la negroj de Afriko ne nur ne havas literaturon, sed aplikas tre neperfektajn lingvojn por interŝanĝi kelkajn ideojn de sia primitiva cerbo. Ĉiuokaze tiu, kiu vojaĝis en Afriko, estas demandata: "Kiel ili interŝanĝas siajn ideojn? Ĉu ili havas lingvon? Ĉu ne estas idiomo, dialektoj formitaj el kvar aŭ kvincent vortoj?" Eĉ iu verkisto foje asertis, ke la negroj nur havas je sia dispono, por esprimi la pensojn, kiuj transpasas la malgravajn bezonojn de l' ĉiutaga vivo, la "malgrand-negran" idiomon, tiun ĉi ridindan balbutaĵon faritan el fuŝita franca lingvo, aŭ la "piĝin", kiu estas la plej ridinda angla lingvaĵo de l' mondo.

Tiu eraro estas grava. Ne nur la negroj de Afriko havas sufiĉe kompletajn lingvojn, ĝenerale, por transiri larĝe la bezonojn de l' komuna vivo kaj la interrilatojn de l' individuoj kaj de la komunumoj, sed ekzistas gravaj literaturoj, kiuj kvankam nekonataj en la mondo, tial ne estas malpli plenaj da gusto.

Klarigo necesiĝas, ĉar iutage la negraj literaturoj, kiel ilia arto, perdiĝos. Kaj tiu tago ne estas malproksima. La aŭtomobilo, la komforto, la eŭropaj kutimoj konkiras pli kaj pli la indiĝenon. Vivi kiel ni, estas por li la lasta dandemo. Post nelonge kreiĝos interhelpa lingvo, simila al la idiomo de Martiniko aŭ Reünjon (Réunion)[1], miksaĵo el franca, negra, araba, laŭbezone, kaj el kelkaj vortoj, kiujn la fremduloj lasas sur trapasata vojo kiel semoj perditaj aŭ juveloj forfalintaj.

La negraj literaturoj estas multnombraj. Sole en okcidenta Afriko ekzistas ses aŭ sep, kiuj superregas distinge la amason de l' dissemitaj triboj, kiuj servas al ili kiel distinga lingvo. La afrika oriento kaj la centro posedas similajn, kaj laŭdire la Masais-tribo, ekzemple, povis entrepreni grandiozajn parol-turnirojn, kompareblajn kun tiuj de ĝiaj okcidentaj kuzoj.



Indiĝena vilaĝo en Senegalio

Por fiksi la temon, ni prezentu kiel ekzemplon nur du lingvojn de l' okcidenta Afriko, kiuj estas la plej disvastigitaj: la *uolofo* kaj la *mandingo*. La unua estas parolata en Senegalio, lando de terkulturistoj, lando egale de tre bonaj marĉandistoj, kiuj dissemis siajn kontorojn de Sen-Lui (Saint-Louis) apud Senegalo ĝis Dahome (Dahomey). La dua estas parolata en Sudano, sur la bordoj de l' Nigero: ĝi estas kolportita en ĉiujn direktojn, misformita de la kuzaj triboj, la mandingoj, bambaras, malinkés, kasonkés, miniankas, diulas. Ĝi estas la lingvo de pli ol tri milionoj da homoj. Ĝi servis al famaj imperioj, kiuj superregis la Sudanon, en la mezepoko, havis konsiderindajn armeojn, parade luksajn imperiestrojn, kies oro vivtenis ĉirkaŭ ili kortegon el altranguloj, scienculoj, jonglistoj, muzikistoj kaj laŭdkantistoj.

Ĉe la kortego de tiuj potenculoj, kiel ĉe la reĝetoj uolofaj de l' Senegalo, konserviĝis la pura lingvo: tie la kantistoj, veraj trubadoroj (= poetkantistoj) de Afriko, ekposedis la poezion, la deklamarton. Tiuj laŭdkantistoj ĝuis grandajn honorojn kaj eĉ povis fariĝi tre influaj privat-konsilistoj. Sed neniam ili povis edzinigi filinon nek de reĝo nek de iu kortegano. Ankoraŭ hodiaŭ ili formas kaston timatan, sed tenatan aparte. Ĵonglistoj, forĝistoj, botistoj, teksistoj, iluziistoj, kantistoj kaj muzikistoj vivas ankoraŭ ekstersocie, geedziĝas inter si kaj havas kiel protektantojn specialajn bestojn, kiel la krokodilon, kiun ne uzas la ordinaraj homoj.

Nomade ili migras de unu familio al alia, de unu vilaĝo al alia, vivante je la kostoj de l' aliaj, trapasas la provincojn kun sia ilaro, sia scio kaj sia vortfarado.

Tiuj homoj enradikigis en Senegalio kaj en Sudano la lingvon de l' uolofoj kaj tiun de l' mandingoj, por nur paroli pri tiuj du. Kelkaj el ili estas famaj en la nuna tempo, la memoro pri aliaj restis tre viva kaj ili estis ĉiam ekzemplodonaj. Kolektante dum siaj rondiroj la neologismojn kaj la lingvajn trovaĵojn, ili daŭrigas enigi

[1] Insuloj en Hinda Oceano proksime al la Afrika orienta bordo.

ilin en sia vortaro; kaj ili instruas al siaj infanoj kaj siaj disĉiploj literaturon, kiun ili ricevis de l' prapatroj kaj kiun ili pliriĉigis per siaj propraj spertoj kaj sia propra genio.

La arto estas preskaŭ ekskluzive buŝa. Se oni iafoje renkontas skribkapablan homon, li estas konvertito al islamismo, kiu arabe desegnas versojn de l' Korano. Sed la grandiozaj periodoj, la krioj de poeta entuziasmo de l' kortegaj kantistoj, la mirindaj kaj plenfilozofiaj fabeloj, kiun rakontas la maljunuloj en la bonfara ombro de l' arboj sur la publika placo, ĉiuj tiuj imponaj paroloj forpasas kun la orienta vento aŭ konserviĝas nur en la memoro de l' atentemaj kaj ravitaj aŭskultantoj.

Nun la objekto mem de tiu literaturo malvastiĝis. La reĝoj preskaŭ ĉiuj malaperis. Sub ilia aŭtoritato la poezia flamo kaj la parola ardo transmetiĝis regule de patro al filo. Hodiaŭ la ĉefoj estas malpli gravaj, sed la amaso volas ĉiam distriĝi per kantoj kaj muziko de l' kantistoj kaj poetoj. Kaj por kontentigi la popolon, la ĉefoj estas devigataj malriĉiĝi sin por teni malgrandan kortegon. Sed estas malfacile glorkanti pri la rajdado de eskorto el dudek rajdistoj, la regula pagado de l' impostoj, kaj la vizito de regnestro. Kaj ĉar la negroj ignoras la kvaliton de l' pejzaĝoj, la sekretan animon de siaj arbaroj, la belon kaj parfumon de l' floroj, ili ne povas fortigi sin en la naturo.

Aliflanke, la virino estas prikantata nur, se ŝi estas reĝino aŭ knabino. Pri la infano mem, kiu estas adorata, kiu estas la vera mastro de l' domo, estas malpermesite paroli kun laŭdoj aŭ kontento pro timo altiri la malbonan sorton. Restas do nur la historio pri la pasinto, la prapatroj de l' lokaj personoj kaj la altanimeco de iliaj antaŭuloj, kaj ankaŭ la satiro, kiun oni ne malatentas.

Malgraŭ tio ĉi tiu literaturo kun pli limigita trafpovo ol nia sufiĉis difini la lingvon. En aristokrataj domoj oni hodiaŭ ankoraŭ povas aŭdi la perfektan uolofon, meze de Senegalio, dum oni samtempe aŭdas tute malsevere parolatan uolofon en la suda regiono kaj veran "kuirej-uolofon"[1] sur la kajoj de Dakar parolatan de ĉiuj vagabondoj de l' lando. Sed laŭ ili kutime formas al si opinion neinformitaj vojaĝantoj.

La lingvoj mem prezentas kompletan ilon por interrilatoj inter la individuoj kaj komunumoj. La teknikaj terminoj kompreneble, kiuj respondas al maŝinoj kaj novaĵoj importitaj de l' eŭropanoj, estas prenitaj el la diversaj lingvoj de l' vizitantoj aŭ konkirantoj. Tiel oni trovas anglajn vortojn en la ŝip- kaj mon-terminoj, portugalajn en la masonmetio kaj kuirejo; abundas pli modernaj francaj vortoj. Ankaŭ la arabo lasis postsignojn pro l' islamo kaj la sklaveco. Oni devas bone scii, ke ĉiu gesto, ĉiu penso, ĉiu intenco, ĉiu ago, pozitivaj aŭ negativaj, havas sian propran esprimon, same kiel ĉiuj objektoj, temp-nuancoj, ĉiuj estaĵoj kaj ĉiuj natur-fenomenoj, kiuj rilatas al la ordinara vivo aŭ akompanas ĝin.

Alivorte, la uolofo kaj mandingo havas sufiĉe kompletan morfologion por senĉese mirigi la eŭropanon, kiu flue parolas tiujn ĉi du lingvojn. Sed ili ambaŭ estas tiom diferencaj inter si, ke ili ne havas pli da simileco ol la germana kaj la hispana. Unuasone sensperta orelo povas distingi ilin. Laŭ la lingva spirito, la diferencoj ankoraŭ estas pli grandaj. La uolofo, fiera kaj kelkfoje vanta, amas la hiperbolan laŭdon. La mandingo estas pli moke spitema. La satiro superregas en ĝia poezio, en ĝiaj kantoj. Sed nek la uolofo nek la mandingo prikantas la floron. Oni okupas sin nur pri la frukto. Rilate al la plej bela monto, la plej malgranda valo kun puto estas preferata de ili.

Oni rimarkis la negran plastikan arton, facile importis ĝin kaj multe parolis pri ĝi. Sed oni nenion sciis pri la negra literaturo. Kvankam diverŝaj versoj estas tradukitaj, oni pro rutino aŭ spirita inerto preferis kredi, ke la okcident-afrikaj negroj esprimas sin inter si kiel la ŝimpanzoj kaj nur disponas pri du- aŭ tricent elementaj vortoj . . .

Mestizo.

[1] Idiomaĉon de uolofo.

FERINDUSTRIO EN URSS

Fero estas skeleto de nuna kulturo. La staton de ferindustrio en tuta mondo montras jena tabeleto:

Ferproduktado de tuta mondo en milionoj da milkilogramoj

Landoj, kiuj produktis feron	Kruda fero		Ŝtalo (hardita fero)	
	en jaro 1913	en jaro 1926	1913	1926
Usono	31,4	40	31,8	47,8
Germanio . .	16,7	9,6	17,1	12,3
Anglio	10,4	2,3	7,7	3,6
Francio . . .	5,2	9,3	6,9	8,3
URSS	4,6	2,4	4,2	2,8
Belgio	2,4	3,3	2,4	3,3
Ceteraj . . .	8,5	11,7	6,0	13,1
Tuta mondo .	79,2	78,6	76,1	91,2*

Ĉi tiu tabeleto vidigas falon de ferindustrio en URSS dum jaroj de mondmilito k Revolucio. Por vere progresi, URSS bezonegas urĝe disvolvi sian ferindustrion. URSS havas grandajn provizojn da ferminaĵoj. Plej gravaj el ili lokiĝas en Ukrainio (Krivoroga regiono), en suda Ural-montaro (Magnitogora regiono) k ĉe rivero Objo en Sibirio (Telbes-regiono). Du lastaj el ili estas novaj k ekspluatiĝas post Revolucio. Por atingi burĝajn landojn k poste superi ilin la ekspluato devas okazi en amerika skalo. Tiel okazas malgraŭ multaj malhelpoj. En nova magnitogora regiono ĉe rivero *Ural* estas konstruata kune kun giganta ferfandejo nova urbo *Magnitogorsk*. Ĝia plano devas esti konfirmita 15-a de decembro de nuna jaro laŭ raporto farita al registaro de URSS de K-do Smolj'aninov. La urbo devas esti finkonstruita ĝis oktobro de jaro 1932, kiam ĝia loĝantaro egalos 30 000 homojn k post ankoraŭ kelkaj jaroj — 60 000 homojn. Nun la urbo jam havas laboristan manĝejon por 2500 personoj. Ĉe la urbo lokiĝas kvarpinta *Magneta monto*[1], kiu liveros pojare 1 125 000 milkilogr. da ferminaĵo (la minaĵo entenas meze 60% da pura fero). La elspezoj por ricevi unu milkilogr. da ferminaĵo en Magnitogorska regiono nun egalas ĉ 22 orgramojn (29 rub.). Tuta provizo da ferminaĵo en ĉi tiu regiono laŭ lastaj esploroj egalas ĉ 275 000 000 milkilogr. Ĉi tiu kvanto estas sufiĉa por ĉiuj bezonoj de URSS dum 200 jaroj. *Telbes-regiono* en Sibirio ne estas pli malriĉa k krom tio ĝi najbaras tre riĉan karboregionon *Kuzneckan*, kies ekspluato same bone progresas. La malnova Krivoroga fermin-regiono en Ukrainio (unu el la plej riĉaj en la mondo) ekspluatiĝas jam de antaŭ longe. En 1928 tie ĉi estis okupitaj ĉ 17 000 laboristoj, kiuj jare liveris 4 600 000 milkg. da ferminaĵo. Do socialisma progreso de URSS estas bone garantiita, ĉar bone progresas ĝia bazo — ferindustrio.

M. Krjukov.

* Kvanto da ŝtalo superas kvanton da kruda fero en la jaro 1926, ĉar ĉi-jare estis utiligata por fandejoj malnova senutila feraĵo pli intense.

[1] Ne miksu kun alia samnoma monto, kiu troviĝas en alia regiono de Ural-montaro.

PROLETARIA KANTARO

La elekto de la kantoj, ilia proleta tendenco, ilia internacia valoro, la fakto, ke ĉiu povas studi kaj kanti ilin dank' al la muziknotoj zorge presitaj, faras el tiu volumo unikan verkon, kiaspeca ne ekzistas ĝis nun en iu nacia lingvo.

Prezo: 2,50 mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

PACO SUR TERO!

Sangante el mil vundoj, malĝoja kaj senrajtigita kiel neniu popolo antaŭe, tiel la germana popolo alproksimiĝas Kristnaskon. Vere, ni proletoj travivis neniun kristnaskon, sed male multajn suferojn. Ja, riĉe kovrita estas la donactablo ankaŭ en tiu ĉi jaro. Tiel riĉe, ke ni devas timi, ke la branĉoj de l' tradicia arbo rompiĝos, pro troa ŝarĝo. Raciigo, malaltigo de l' salajro, "konkordato" (ŝtat-eklezi-kontrakto), Jangplano estas fakte nur parto de la multaj donacoj, kiujn oni donis al la proletoj en Germanio ĉi jare. En ĉiuj preĝejoj, en kongresoj kaj en la burĝaj gazetoj oni babilas pri amo kaj paco. La sata burĝo, la ekspluatistoj kaj la burĝe pensantaj laboristoj, ili ĉiuj fariĝas sentimentalaj kaj revas pri paco kaj amo. Samtempe armas sin la malamiko de l' laboristaro. En ĉi tiu momento estu malkovrita ĉiu moko kaj mensogo, per kiu estas kovritaj la faktoj sub aro da frazaĵoj.



Originale por Sennaciulo

Sed ni estu honestaj. Ĉu ni ĉiuj jam liberigis nin de l' burĝaj sentimentaloj? Ci, laboristino, ĉu ci ne tuŝiĝas de mola emocio, vidante kristarbon kaj memorante pri cia junaĝo, pri la silenta nokto? Sed kiu volas malaserti, ke en ni ĉiuj ekflamas la sopiro al amo, frateco kaj paco? Ci, laboristo, ne forgesu, ke la vojo gvidas nur trans la grandan komunumon de la produktantoj. Nur en socialista komunumo povas kreski amo kaj interfratiĝo sur la principo de senekspluata socio. Proletoj, ekkonu la mensogojn, kiujn la hodiaŭa kapitalista mondo prezentas al vi! Detrui la karcerojn, en kiuj malsatas la batalantoj de l' socialismo, forigi la suferojn, reformi la homaron en la senco de vera amo kaj frateco, devas esti niaj kristnask-salutoj anstataŭ kanti kaj ekbruligi kristnask-kandelojn!

Vekiĝu proleto, via forto estas la animo de la socia vivo! Disŝiru la ĉenon de la sklaveco kaj koncentru vian forton al la vera idealo!

Antaŭen por la sociŝanĝa revolucio!

SAT-ano 5800

Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)

(6-a daŭrigo. Vidu n-ojn 267/72)

Tri signifaj desegnoj aperis en usonaj laboristaj ĵurnaloj: en unua desegno, mastro diras al laboristoj: "Nun, amikoj, ni devos pli produkti por ne fermi la fabrikon." En dua desegno: "Nun, bedaŭrinde, ni tro produktis. Mi estas devigata maldungi vin." En tria desegno, la mastro staras antaŭ superproduktaĵo: "Al kiu mi ĝin vendos?" Oni vidas flanke, antaŭ fabriko, la maldungitajn laboristojn sidantaj sur benko. Ili povus aĉeti . . . se ili laborus. Jen bona resumo pri tiu problemo.

Mastroj usonaj klopodis atingi, ke ilia klientaro mendu por la tuta jaro, en industrioj, kiuj sezone laboras, alian sezonon nefunkcias. Mastro deklaris al Dübreŭj, ke li *tuj provus* (ĉiam "provi", bona usona kutimo) ĉiun sistemon por plibonigi la vivon de sublaboristoj, kiuj pli suferas, por forigi senlaborecon. Sed ĉu ekzistas kuraco por senlaboreco en kapitalismo? Ĉiuj provoj estis nur duonhelpoj ĉe granda malhelpo antaŭ *"robot"*.

Protekto kaj higieno en laboro

Ĉie afiŝoj: "Safety First" (unue ŝirmilo), linioj sur pavimo kaj skribaĵoj, kiuj malpermesas marŝi sub pecoj, transportaĵoj, kiuj povus fali sur kapon. Precipe en la plej danĝeraj industrioj en Usono, oni tre zorgas pri protektado kontraŭ vundebloj. Ekzemple, ĉe "National Tube Co." (Nacia Tuba Ko.), najbare al Pitsbög (Pittsburg), dum 11 jaroj nombro da gravaj akcidentoj falis de 1100 ĝis 44: unu anstataŭ 25. — En kelkaj fabrikoj, la laboristoj estas devigataj uzi gantojn por eviti oftegajn man-vundojn. Specialaj komitatoj, ekzemple unu, kiu konsistis el du laboristoj, du submastroj kaj unu mastro, prizorgas la "ŝirmilon". Post ĉiu akcidento tiu komitato devas verki raporton: Kies kulpo okazigis la akcidenton, kiuj rimedoj permesos eviti saman estonte.

En preskaŭ ĉiuj fabrikoj Dübreŭj trovis saman bonan "ŝirmilon", kiun li pli speciale pristudis ĉe Ford, ĉar li tie pli longe laboris. Li metas en sian libron la konsilojn, kiujn ricevas per karto ĉiu dungito ĉe Ford, ekzemple: "Vi laboru prudente, ne vestu flirtantajn kravatojn aŭ vestojn, nek gantojn ĉe turn-maŝinoj: torniloj, boriloj. Ne tuŝu ne konante elektrajn instalojn, ne metu la kapon sub suprenigilon por vidi, ĉu ĝi malsupren alvenas, . . . ktp.

Ĉe iu matricmartelanta maŝino laboras du homoj. Estus danĝere, se unu povus ekfunkciigi matricilon, dum la manoj de la dua estas sub rompiloj. Por eviti tion, la maŝino nur ekfunkcias, kiam per kvar manoj ambaŭ laboristoj premas kvar butonojn. Tiel neniu el la kvar manoj povas esti en maŝinmakzelo samtempe.

La hejtado en Ford-laborejoj estas bona: eĉ dum vintro Dübreŭj laboris nur en pantalono kaj ĉemizo. Tion li neniam spertis en Francio, kie laborejoj vintre tre malbone estas hejtataj. La necesejoj funkcias bone, estas ĉiam puraj. Eĉ ne mankas higiena papero: tian lukson Dübreŭj neniam vidis en francaj laborejoj.

Por tagmanĝo la laboristoj ĉe Ford nur libertempas 20 minutojn, do ili eĉ ne lavas la manojn. Oni liveras al ili sur veturiletoj panon, lakton, kafon, ŝinkobulkojn kaj kukojn en laborejoj, iom malpli koste ol en urbaj privatvendejoj. Eble iom malhigiena estas tiu mallongega manĝo en mezo de la ok laborhoroj. (Mi, raportanto, pensas: ne). — Sed tiom agrabla estas vespere pli frue foriri, opinias Dübreŭj.

Dübreŭj unufoje estis vundita ĉe la kapo, preterpasante sub granda bormaŝino, kies borilo hazarde ne estis forprenita post laboro. Li ricevis karton de submastro, kiu notis lian forirhoron, estis bonhigiene flegata en kuracloko, kaj ĉar venis iom da febro poste, la kuracisto demandis: "Ĉu vi posedas aŭton ĉi tie?"

Dübreŭj ne havis personan aŭton. La kuracisto kondukigis lin hejmen per aŭto de la fabriko, en kuraceja kovrilo bone envolvitan.

Laboristaj Unuiĝoj

Tiuj unuiĝoj estas preskaŭ samaj, kiel eŭropaj laboristaj organizoj, skribas Dübreŭj. Do, li nur citas kelkajn pentrindajn karakterizojn de iaj usonaj unuiĝoj plej malsamaj. Multaj federoj da sindikatoj presas markon ("label"-on) de sia Federo sur produktoj labor-

itaj de sindikatanoj. En Francio nur la "Federo de Presistoj" sciis trudi tion al la mastroj, kaj ĉiuj gazetoj portas "label"-on, markon de Presistfedero. En Usono, federoj de ŝuistoj, vestistoj, ĉapistoj, presistoj, multaj aliaj faklaboristoj, presas "labelon" sur varoj; eĉ sur cigaroj Dübreŭj vidis tian "labelon".

La leĝoj estas ankoraŭ pli malfavoraj al sindikatoj, en Usono, ol en Francio. Sed Dübreŭj pensas, ke francaj mastroj sukcesas leĝe aŭ neleĝe tiom bone malhelpi sindikatojn, kiom usonaj mastroj per usonaj leĝoj.

Kooperativojn ili kreas en Usono. ekzemple "Amalgamated Clothing Workers of America" (UnuiĝintajVestlaboristoj de Ameriko), kiujn ili konsideras kiel *duan linion (rezervon) por defendo de l' laborularo,* en kiuj la laboristaro spertiĝas en praktika laboro.

Post kooperativoj kreiĝis dum 1923 Laborbanko: "Amalgamated Bank of New-York" (Unuiĝinta Banko de Novjorko), kies sidejo troviĝas nun en kvaretaĝa domo de l' financkvartalo "Union Square" en Novjorko:

1924: 2 847 000 dolaroj, 6 475 kontoj,
1927: 9 370 000 dolaroj, 15 397 kontoj.

Apud tiu banko, A.C.W. (t. e. la Vestlaborista Unuiĝo) kreis "Unuiĝojn por Kredito", kiuj bone sukcesas kaj pruntedonas al ĉiuj, kiuj ĝis nun prunteprenis laŭ fi-procentegoj ĉe ekspluataĉistoj.

Leo Ŭlmen (Wolman), dum komenciĝanta striko, anstataŭ elspezi la vestsindikatan monon por helpi senlaborecon, persvadis al strikantoj lui laborejon per la sama mono kaj krei kooperativon. Tiu kooperativo tuj bone funkciis. Tiel same kreiĝis en Francio "Laborista Vitrofabriko en Albi" (Verrerie Ouvrière d' Albi), kiu funkcias, kvankam reakciuloj rakontadas senlace k malvere, ke ĝi malsukcesas, skribas Dübreŭj.

Dübreŭj montras strangajn praktimetojn en kelkaj usonaj unuiĝoj, verajn preĝojn en sindikatoj ktp. Senspiriteco en Usono helpas tiujn tradiciojn, komediojn, kvankam, en tiom nova lando, ili povos nek disvolviĝi nek daŭri.

En Ĉikago, sindikat-unuiĝo posedas radio stacion, kiun oni aŭdas ĝis Novjorko kaj ĝis Frisko (S. Francisko). Ĉikagaj anoj, kiuj ne posedas ricevilon, povas aŭskulti en apudaj salonegoj. Tiajn tre multekostajn elspezojn pagas specialaj kotizoj, kalkulitaj per divido de la elspezoj laŭ nombro da anoj. Ĉiu bone pagas.

Eĉ virinoj de sindikatanoj unuiĝas, ne en faksindikatoj de siaj edzoj, kompreneble. Sed ili organizas apartajn virinajn societojn, kiuj pritraktas la salajrdemandojn kaj influas precipe la publikan opinion. Dübreŭj rimarkigas, ke virinaro de "protestantkristanaj" gentoj estas pli agema, grupiĝema, propagandema, ol katolikaj virinaroj. Virinoj de metal-sindikatanoj estas tiel organizitaj en apudsindikata virinsocieto.

(Daŭrigota) *Jief.*

akcepton kaj en espero de mendoj ankaŭ diversaj industriestroj. Sed ĉefe la laboristoj kaj la K. P.-anoj ĝojis pro la tiel montrita teknika progreso de Sovetio.

* * *

Dum du jaroj la financistoj atingis sian paradizon. Ĉiutage prezoj de akcioj suprenflugis. Novan kapitalon facile ili trovis. Kompanioj ŝvelis, kuniĝis kaj ĉiam la informitoj profitis. Sed rapidege en sept./okt./nov. la miliardoj malaperis kaj akciprezoj falas. falegadas. Kio kaŭzis tion? La spertuloj parolinte pri nova epoko de senfina prospero silentas. Perdinte monon per spekulacio la akciuloj iom ĉesas aĉeti. La Prezidanto alvokis la ĉefojn kaj petis, ke ili helpu en la kriza afero per pli granda mendado.

Denove aperis la necerto, timo pro senlaboreco, ĝenerala manko de fido kiel en aliaj krizoj de la kapitalista sistemo alilande.

* * *

Fine Tom *Muni* (Mooney) havos ŝancon liberiĝi. De la j. 1916 li kaj lia kolego Ŭarn *Bilings* (Warren Billings) suferis en malliberejo. Ĉiu krom guberniestro Jang (Young) konvinkiĝis, ke Muni ne ĵetis la bombon en San Francisko, 22-an de julio 1916. Eĉ la juĝisto kaj la juĝantaro nun neas lian kulpon. Sed li estis "danĝera radikalulo" kaj en malliberejo lia hararo blankiĝis dum la longaj jaroj. Nun elkovriĝas mortlita konfeso de homo, kiu diras, ke estas li la krimulo, kaj pro tio la reakciuloj devas rekonsideri la proceson. *(488)*

★

Malŝatu la naciajn lingvojn!

La urbanoj kalumnias kamparanan dialekton; ili diras, ke alilandana parolo estas malpli komprenebla ol la mimiko de mutulo. La naturaj naciaj lingvoj ne pereos pli frue ol la ŝtatoj, sed tiam la homaro aŭ la mondo nepre fratiĝos per unu komuna lingvo, kiam la landlimoj estos forigitaj. En malnova eluzita lando, kiel tiu ĉi lando, ties lingvo per kutimiĝo enhavas multe da esprimoj de ŝtateca kaj klaseca signifo, tiel ke eĉ en plej atente skribitaj dokumentoj oni ofte trovas klare videblan diferencon inter burĝa kaj proleta esprimmaniero. Enterigu la malpurajn nacilingvojn kune kun kadavroj de fiburĝoj, kiel polvon de l' estinto, uzitajn de nacioj dum jarmiloj por defendi la aŭtoritaton. Esperanto jam estas proponita kaj ĝi estas facile lernebla; sed ni ankoraŭ ne havas la libron eĉ legi skribaĵojn en ĝi, kaj ni uzas malfacile tiujn frenezigajn literojn de nacilingvo. Ankaŭ tio rezultas de tio, ke ni naskiĝis ĉi tie en "Granda Japanio". Post nelonge okazu detruego de nacilingvoj, kaj ĉiuj presliteroj estu refandotaj, ĉiuj signotabuloj reskribotaj. Tiam verdaj flagoj de esperanto marŝu antaŭ popolamaso, kiam ankaŭ niaj pugnoj ?????? (kelkaj vortoj malpermesitaj de la japana cenzuro) bataladu en la fronto! Malŝatu naciajn lingvojn! Ribelu kontraŭ la patrina lango!

El la japanlingva gazeto "Rodoŝa" (Laboristo) n-o 7.

★

EL USONA TAGLIBRO

Novembro

En komenco de novembro la urbo Novjorko elektis estron. *Tomas* (Thomas), la socialisto, ricevis 174 931 voĉdonojn; *Ĝons'n* (Johnson), la socialist-lab. partianino 6602, kaj *Ŭajnston* (Weinstone) de la kom. partio 5622. *Ŭalker* (Walker) retrafis sian oficon per 856 549 voĉoj. Denove la profitaĉistoj povas dormi pace. Antaŭ kvar jaroj en la lasta elekto Tomas ricevis nur 39 574 voĉojn; tial la Socialista Partio kuraĝiĝis pro la rezulto

* * *

Entuziasma granda amaso bonvenigis la aeroplanon "Lando de Sovetoj". kiam ĝi fine atingis Novjorkon, trans Usonon kaj Siberion. Eĉ Ford mem kaj la fama Lindberg partoprenis la

Rekord-rikoltoj de teo

Oni anoncas, ke Hindio kaj la hindoĥinaj insuloj faris escepte riĉajn terikoltojn pro favoraj klimataj kondiĉoj. Inter 1. aprilo kaj 1. aŭgusto proksimume 4,5 milionoj da kilogramoj da teo pli ol en la konforma periodo de l' antaŭirinta jaro estas ekspeditaj el Kalkuto kaj Ĉitagong al Granda Britio. La eksportoj de suda Hindio, dum la unuaj sep monatoj de l' jaro, pliiĝis je 2½ milionoj da kilogramoj. Je 31. aŭgusto, Cejlono estis eksportinta depost jarkomenco al Granda Britio ĉ. 50 milionojn da kg. kontraŭ 46 milionoj eksportitaj dum la 8 unuaj monatoj de l' antaŭa jaro. Javo kaj Sumatro pliigis siajn eksportojn por la unua duonjaro je 2½ milionoj kaj 0,7 miliono respektive; aliparte, la rikoltoj de l' norda Hindio estas taksitaj fine de aŭgusto je ĉ. 100 milionoj kontraŭ 90 en la antaŭa jaro. Estas do neniel surpriza, ke la provizoj en Londono transpasas 85 milionojn da kg., t. e. 13,5 milionoj pli ol antaŭjare; la prezoj sekve restos sendube malaltaj. La situacio de multaj sudhindaj plantejoj, kiuj vendas je memkosta prezo aŭ pli malalte, estas konsiderata kiel serioza.

SENNACIULA VIRINA PAĜO

Sub la kontrolo de Virina Sekcio de SAT. — Red. Adreso: Elma Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.

Paĝo el ŝia vivo

Kiu ne scias pri stato de l' orienta virino? Senrajta, preskaŭ besto, ŝin povas vendi patro aŭ frato. Pri ŝiaj deziroj neniu demandas: ŝi nur devas plenumi la dezirojn de l' edzo aŭ patro.

Tiel estis, sed tiel ne estos. Blovas nova vento, novaj vortoj sonas en *aŭl-oj* (indiĝenaj vilaĝoj), novaj tempoj alvenas.


Nur Ĝamal Sojnova

Ĉetablo, en malgranda ĉambreto de komuna loĝejo de Mez-Azia Universitato, sidas junulino kaj lernas geografion. Ŝia nomo estas *Nur Ĝamal Sojnova.* El dezerto de sablaro ŝi alvenis. La infaneco de Nur Ĝamal estis tre mallonga. La juneco ne ekzistis. Kiam ŝi havis 11 jarojn, la patro diris al ŝi: — Ci estos edzino de Kurban Baj. Ci estos tre feliĉa, ĉar li estas riĉa homo kaj ci estos edzino de komercisto.

Kaj la 11-jara knabineto ekfariĝis virino. La edzo havis 70 jarojn.

Sekvis malĝojaj tagoj. Nur Ĝamal estis sola en "kibitka" (domo). Neniu helpis ŝin mastrumadi. Nutri kaj trinkigi bestojn, kuiri manĝaĵon — ĉion ŝi devis fari mem. Kaj kiam vespere alvenis la edzo, en "kibitka" sonis plorado de knabino kaj krioj de maljunulo. Ŝi ne povis esti bona mastrino kaj plenumi ĉion — kaj skurĝo fajfis aere kaj vergita knabino ploris tutan nokton . . .

Unu tagon ŝi bone memoras. Matene la edzo tre longe batis ŝin kaj poste kolerante forveturis.

— Iru, Nur Ĝamal, diris najbarino — alvenis rusa virino, ŝi vokas nin, ŝi deziras paroladi kun ni.

En tiu tago multe da novaĵoj eksciis Nur Ĝamal kaj interalie aŭdis, ke en urbo Aŝĥabad estas domo nomata "domo de malriĉa turkmena virino". Tie ĉiu turkmenino povus trovi azilon kaj defendon.

Pri venonta forkurado scius paroli nur la 10-jara frato de Nur Ĝamal. Unufoje post elveturo de Kurban Baj ŝi forlasis la *aŭlon*. Malfacila vojo estis sekvenda tra sabla dezerto. Ĉiu vojaĝanto estas ŝia malamiko, ĉar laŭ moroj li devas haltigi edzinon forkurantan. Tial ŝi kaŝis sin, kiam ŝi ekvidis veturanton.

En la urbo ŝi trovis la Domon. La estrino aŭskultis ŝian knabinan rakonton kaj diris al ŝi: — Enlitiĝu kaj dormu trankvile. Ĉi tie neniu tuŝos vin.

Sed kiam la knabineto ekrigardis tra fenestro, ŝia koro ekbategis en la brusto: ĉe la enirejo de "Domo de turkmena virino" staris tri parencoj de Kurban Baj.

— Ne redonu min! Ili mortigos min! . . . Poste aliris ŝia patro. Li longe petegis ŝin reveni al Kurban Baj kaj ne fari malhonoron . . . Li minacis, ordonis, malbenadis ŝin . . .

Post kelkaj tagoj alvenis proprapersone Kurban Baj. Laŭ antikvaj uzbekaj moroj estas granda malhonoro kaj honto por turkmeno, se lia edzino forlasas lin. Li povus mildigi la malhonoron eble nur per sango ŝia aŭ el ŝia parencaro.

Tutan jaron ne eliris Nur Ĝamal el domo. Ŝi timis . . . ellernis legi kaj skribi. Nun ŝi estas studento de Mez-azia Universitato.

La rakonto ne estas escepta okazo: similajn historiojn pri sia vivo rakontos al vi preskaŭ ĉiuj tieaj studentinoj. *Esp-igis B. Popov (1089).*

La laboro inter virinoj en USSR

En ĉiu fabriko laboron inter virinoj gvidas virina komisiono de partia ĉelo. Nia telegrafejo ankaŭ havas virinan komisionon, kiu konsistas el 9 personoj (laboristinoj). Ĉiu membro de l' komisiono laboras en la telegrafejo, sed dum libertempo havas alian partian laboron de l' komisiono. Ekzemple la 1-a membro estas prezidantino, la 2-a sekretariino de l' komisiono; la 3-a laboras inter hejm-mastrumantinoj, 4-a en klubo, 5-a en kooperativoj, 6-a zorgas pri la pres-aferoj, 7-a ĉe propravolaj organizoj (amikoj de infanoj, Intern. Ruĝa Helpo, likvido de analfabeteco ktp.) kaj 2 membroj laboras kiel virin-organizantoj en fakoj de l' telegrafejo. Prezidantino kaj sekretariino gvidas laborojn de l' apartaj komisionaj membroj. La membro, kiu laboras inter hejm-mastrumantinoj, devas organizi kunvenojn en klubo aŭ en grandaj domoj, kie estas specialaj ĉambroj por tio. Dum tiuj kunvenoj oni elektas delegitojn unufoje dum jaro, kiuj devas labori en sekcioj de sovetoj aŭ en klubo. Ili laboras simile kiel delegitinoj de fabrikoj kaj telegrafejo kaj raportas pri sia laboro unufoje dum 3 monatoj en kunveno de hejm-mastrumantinoj. Tiu komisiona membro organizas kelkajn rondetojn en la klubo kaj en grandaj kunvenejoj, ekzemple sanitarajn, kudrajn, analfabet-likvidajn, politikajn ktp. Ŝi legas lekciojn por hejm-mastrumantinoj pri virinaj kaj infanaj malsanoj, pri aborto, pri veneraj malsanoj ktp. Ankaŭ la virinojn interesas politikaj demandoj kaj virinaj rajtoj, pri kiuj bone estas informitaj la fabriklaboristinoj. En kudraj rondetoj ankaŭ okazas politikaj interparoloj. La komision-membro devas lerni labori en sekcioj de soveto, devas edukadi la virinojn, por ke ili komprenu ĉiujn taskojn de soveta registaro kaj helpu labori. Ankaŭ ili ne devas malhelpi labori al siaj edzoj.

La komision-membro en *klubo* devas agiti kaj klarigi al ĉiuj laboristinoj, ke ili en la klubo ricevas racian ripozon, sed devas partopreni en la klublaboro. La membro devas entiri laboristinojn al ĉiuj rondetoj, vesperaj familiaj festoj, ekskursoj kaj kolektivaj promenadoj.

La komision-membro laboranta ĉe kooperativoj devas proponi al laboristinoj membriĝi ĉe kooperativo, poste instigi al aktiva kunlaborado ĉe kooperativa administrado, en manĝejoj, bakejoj, magazenoj ktp. Pri malbonaj punktoj en kooperativa laboro la aktivuloj tuj devas raporti al administrantaro, por korekti erarojn en la laboro.

La membro zorganta pri pres-problemoj devas instigi laboristinojn pli multe skribi por murgazetoj pri bonaj kaj malbonaj flankoj de l' komitato, administrantaro, sovet-sekcio, klubo, kooperativo ktp. Ŝi devas ĝustatempe paroli pri politikaj demandoj, poste mem verki por la murgazeto pri tio. Krom tio ŝi devas helpi al la virinoj legi ĵurnalojn, instigi al abono. La membro por propravolaj organizoj havas similajn taskojn rilate al tiuj organizoj. Ankaŭ en siaj propraj profesiaj fakoj kompreneble la membroj aktive laboras. Por formi la komisionon kun ĝiaj kunlaborantoj, la laboristinoj elektas ĉiujare 1 delegitinon po 10 fabriklaboristinoj kaj 1 po 15 nefabrikaj laboristinoj. Ĉiuj gvidantoj instruas detale tiujn delegitinojn pri ilia laboro. Ekzemple en malsanulejo laboristino kontrolas, ĉu oni bone flegas, ĉu la manĝo estas bona, la tolaĵo pura. En mala okazo la delegitino raportas al la soveto, kiu korektas la mankojn. Similaj kontroloj okazas en kooperativoj kaj aliaj fakoj. Post elekto de novaj delegitinoj (post finiĝo de l' mandato de la antaŭaj) la malnovaj devas helpi al la novaj

DISKUTEJO

Vegetarianoj kaj Vegetarismo

Enmetinte en la kvar lastaj n-oj la unuajn manuskriptojn ricevitajn sekve de la artikoleto "Nia gazeto estu ĉiam klasbatala" de K-do 10 380, ni aperigas ĉi sube resumon el la ceteraj artikoloj ricevitaj pri la sama temo. Per tio ni evitas ripeti la samajn argumentojn k misuzi la spacon. — Red.

K-do *Ludwig* (Ĉeĥoslovakio) rimarkigas, ke li estas laboristo, plenumas pezan laboron (hejtisto ĉe fervojo), sed vivas vegetare. Vivi vegetare signifas laŭ li esti tute libera de tielnomataj "kulturakiroj" (alkoholo, nikotino, ĥemiaj nutraĵoj ktp.), vivi simple k sane. "S-ulo" devas akcepti ĉiujn artikolojn, kiuj celas klerigi la laboristaron pri pli bona k pli simpla vivmaniero. Li legis, ke en Germanio oni fortrinkis dum unu jaro (laŭ imposta statistiko) por 4,5 miliardoj da ormarkoj da alkoholaĵoj. Plej multaj konsumantoj estas nature la proletoj.

K-do *14 359* (Germ.) miras, ke K-do en Sovetio (10 380) kritikas tiele. Li pensis, ke Sovetianoj estus pli progresemaj kulture. Tiu K-do (same kiel tiu, kiu skribis kontraŭ nudkulturo) ne havas iun scion pri kialo k profito de l' veget. movado. Se li pravus, ke vegetarismo estas burĝa movado, tio montrus nur, ke la proletaro malpli povas trovi pli bonon ol burĝaro.

K-do *8194* (Estonio) klarigas, ke oni estas vegetarano 1. pro higienaj motivoj; 2. pro etikaj k estetikaj konsideroj; 3. pro materiaj kaŭzoj (ŝparemo). "Eble K-do 10 380 opinias, ke kiel finidealo homoj devas esti krudaj, sensentaj mastroj super senvivaj maŝinsklavoj? Mi ne kredas, ke iu povas ne aprobi, se malbone pagataj laboristoj ŝparas monon per vegetara sinnutrado por elspezi ĝin ekz. por "S-ulo" k aliaj spiritaj celoj. Mi persone konsentas sangverŝon (kvankam estas abomene) por renversi la nunan maljustan sociordon, sed ne komprenas, kial mi en Estonio devas tratranĉi ŝafan gorĝon nur pro tio, ke ie en Manĉurio tondras kanonoj. Vegetarismo ne estas ismo okupanta la *tutan* cerbon de normale pensanta homo, sed taŭga por ŝparigi al la proletaro (kiel abstinismo, nudismo k. a.) monerojn, bezonatajn por klasaj celoj."

K-do *601* (Germanio) opinias, ke ne manĝi kadavrojn estas persona afero, kiun oni povas nomi kultura evoluŝtupo de l' individuo. Ĉefafero restas, ke la K-do aktive k praktike kunlaboru en SAT aŭ aliaj prol. organizoj por liberigo de l' suferanta laboristaro. La batalanta proletaro pli bone sukcesas, se la proleto staras sur la batalkampo kun klara cerbo k sana korpo. Ne ĉiam la kapitalisma sistemo kulpas, kiam iu proleto krimas kontraŭ sia korpo, kontraŭ propra familio k sekve kontraŭ propra klaso; ofte li mem kulpas. "Dum 30 jaroj mi estis karbministo, laboris en malsekaj ŝaktoj, malsaniĝis je reŭmatismo, fidis plene al kuracarto de medicinisto. Sed tiu ĉi mem suferis je la sama malsano, de kiu li volis liberigi min, k mi dubis. Mi komencis mem studi funkciojn de l' korporganoj, esploris, kontrolis, resanigis min (ĉefe per sunradioj). Mi eksciis, ke estas homoj kun doktortitoloj, kiuj estas stultuloj rilate al sia propra korpo. Aliaj havas bonan teorian scion, sed ne riskas apliki ĝin pro tradiciaj kutimoj, ĝenerala opinio, modo aŭ similaj kaŭzoj. La milito, el kiu mi revenis kun detruitaj nervoj, perdigis al mi lastan eron da kredo al dio k "supera helpo". Tial mi provas almenaŭ vivi hominde nun sur tero k deziras tion al ĉiuj produktantoj. Dum lastaj dek jaroj mi ne plu trinkis alkoholon nek fumis. Post mineja laboro mi ŝatis resti en freŝa aero. Tiel miaj nervoj resaniĝis, sanstato pliboniĝis. Dum ok jaroj mi vivas vegetare laŭ la principo: 'La homo ne vivas per tio, kion li manĝas, sed nur per tio, kion la stomako digestas.' Rezulto, ke mi ne konas dolorojn, korpa k spirita laboro alternas k helpas je saniga dormo. Entute mi ne rimarkis, ke mi jam maljuniĝis. Por eviti miskomprenon, mi klare diru: ĉio ĉi nur koncernas mian hejman vivon; rilate al la reganta sociordo mi helpas forigi ĝin laŭ miaj tutaj fortoj."

K-do *11 304* (Germ.) atentigas pri kruelaĵoj farataj de homoj kontraŭ bestoj. Li citas laŭ kolektitaj spertoj kamparanojn, kiuj bategis, vundis ĉevalojn k bovojn, kamparanidon, kiu ludante kripligis kaptitan leporon, kruelagojn de vilaĝanoj kontraŭ musoj. Ĉu ne estas devo — li demandas — por ĉiuj homoj racie pensantaj batali kontraŭ tiaj krimoj k antaŭ ĉio deteni sin mem, fari ilin? — K-do 13 885 (Germanio) rimarkigas, ke la diskut-artik. de K-do 10 380 estas tipa ekzemplo de blinda fanatiko. "Kondamni ian spiritan movadon pro antaŭjuĝo, sen konoj pri ĝia origino k kondiĉoj, estas kutimaĉo de dogmuloj netoleremaj, kiel eklezianoj k patriotoj, k malinda je klaskonscia racie pensanta SAT-ano. Kun sama logiko kiel tiu K-do rilatigas vegetarismon al kanontondro ĉe ĉinia limo, iutage alia K-do povus deklari la ŝakludon pereiga por la klasbatala ideo pro burĝa deveno k kontraŭrevolucia k imperialista karaktero de ĝiaj reĝaj figurbatalionoj intermilitantaj. Burĝaro, male, kontraŭas vegetarismon per mokaj gazetartikoloj, ĉar veget. vivado malgrandigas la primitivajn vivbezonojn malakceptante produkton de profitdona ĝuaĵ-industrio; aliflanke vekiĝas ĉe proletoj postulo je kontentigo de kulturaj k spiritaj bezonoj. Vegetarismo estas nur sektoro de movado "Vivreformo", kiu celas raciigon de vivmaniero laŭ sciencaj ekkonoj k tial bone akordiĝas kun SAT-principoj. Vivreformo krom ĝusta infanedukado, laŭnatura vivado k vestiĝo instruas ankaŭ vegetarismon, kiun eminentaj sciencistoj subtenas (mi memorigas pri la vitaminteorio praviganta vegetan nutraĵon). Konsumado de viando incitas al ĝuo de alkoholaj trinkaĵoj k fumado, al diboĉoj k malfunkciigo de l' organismo en relative juna aĝo. Eĉ nekuiritaj bongustaj manĝaĵoj ebligas ŝpari multe da tempo k mono. Malpliiĝas ekonomiaj zorgoj. Vegetarismo firmigas la memkonscion k sendependecan senton, kreas sentimon kontraŭ mastra arbitro: sekve pliakrigas la batalkvaliton de l' laboristoj."

K-do *Alice Eper'* (Berlin) konstatas, ke ankaŭ multaj burĝoj, eĉ riĉuloj, aktivas en vegetara movado, sed ke tio ne povas malhelpi klaskonsciajn laboristojn, siaflanke diskonigi vegetarismon, se ili ekkonis ĝin disvastiginda. Same kiel burĝaj esp-istoj volenevole helpas al lab. esp-ismo, tiel ankaŭ en vegetara movado burĝaj propagandistoj senintence utilas al prol. movado. Laŭ li vegetarismo de estetika vidpunkto estas subteninda k eĉ klasbatala armilo kiel konscia vivmaniero. Aliflanke li avertas la vegetaranojn kontraŭ fanatiko: Ili klopodu iom post iom, sen altrudemo, forigi la nunan staton de malvirta vivado kun fumado, alkoholo k ĉiuj ceteraj malnecesaĵaĉoj.

K-do *11 304* (Germ.) same kiel la antaŭa K-do komparas la burĝecon de l' vegetara k esperanta movadoj, demandante K-don 10 380: "Kion vi dirus, se homo tiel ofendus vin, ĉar vi lernis esperanton, kvankam tio signifus, ke vi plenumis vian devon? Estas ne nur utile, sed devo esti vegetarano, por eviti la armurdon al la senpotencaj. Kiom longe ni trinkas sangon, tiom longe ni ne havas rajton protesti kontraŭ la trinkado de nia sango! "Li diras, ke K-do 10 380 ne citis eĉ unu argumenton kontraŭ vegetarismo." "Kiel do efiku fine via alvoko 'protestu kontraŭ preparado de nova milito kontraŭ Sovetio!', se antaŭ kelkaj linioj vi daŭre ofendis la legantojn per brutaj vortoj ... La kontraŭon vi povas atendi. Se tiel vi volas eviti la militon kontraŭ Sovetio, vi nur eksplodigas militon inter la esp-istaro. Tiu, kiu estas kontraŭ milito, devas

---

spertiĝi. Tiel ĉiujare edukiĝas novaj aktivuloj. La virinkomisiono ĉiam havas liston de aktivaj laboristinoj kaj proponas dum elektoj al fakoj (kooperativoj) ktp. siajn kandidatojn. La partia ĉelo raportas dum partikunvenoj pri la virinkomisiono.

K-dino Evdokimova (Moskvo).

Tago el la vivo de laboristo en Usono

Mi estas 30-jara fraŭlo; mia profesio estas taglaboristo. Mi laboras en ladofabriko, kiu apartenas al Tames (Thomas), kapitalisto, kiu pasigas la ĉi-jaran vintran tempon sur la varmklimata insulo Kubo. — Kaj mi laboras ĉiutage 12 horojn, kaj semajne 7 tagojn.

Mi ellitiĝas matene je la 5-a; post purigo, manĝo mi piede iras dum 25 minutoj ĝis la fabriko. Kaj kelkajn minutojn antaŭ la 6-a mia karto estas surpresata de la horloĝmaŝino, mezuranta la precizan tempon de la eniro ĉe la fabriko. 5 minutojn post la 6-a mi komencas labori.

Mia laboro konsistas el alkroĉado de ladoamaso sur la hokon de levilmaŝino, kiu portas la lad-amason tra la aero de rulbloko ĝis rulbloko. Dum mia 12-hora labortempo, mi ne havas tiom da tempo, por sidiĝi kaj manĝi. Sed kiam mi ekmemoras pri mia malsato, tiam mi prenas panon kun viando per mia malpura maldekstra mano, kaj mi tiel manĝas, dum mi per mia dekstra mano laboras.

Mia laboro ne estas malfacila, sed mi devas esti tre gardema por ne vundi min aŭ difekti ion. Kaj ankaŭ mi devas mense labori. Se mi devas iri al la necesejo, tiam mi devas deklari ĝin al la laborpelanto, ke li dum tiu tempo anstataŭigu min per aliu. La laborpelanto vigle ordonas al mi, kion fari. Ekhalti mi ne povas, ĉar la homoj ĉe la *malvarma rulbloko* laboras po milkilograme, kaj ili ne lasas min ekhalti, eĉ ne dum unu minuto. La kapitalistoj bone elpensis, kiel la laboristojn instigi pli kaj pli multe labori kaj krei profitojn. Ili donis laboron al la laboristoj kiel taglaboron, la laboristoj faris ĉiutage 15—18 mil kilogr. da lado (4 homoj): ili ricevis tage $ 4.40 por 10-hora laboro. Poste li eldonis la laboron laŭ milkilogr.: ili ricevis po mil kilogr. 50 cendojn. Kaj la homoj, kiuj antaŭe tage faris kiel taglaboristoj 15 ĝis 18 mil kilogr., hodiaŭ jam faris 25—30 mil kilogramojn. Kaj perlaboris tage $ 12—13. Post 2 semajnoj la kapitalisto reduktis la prezon, je 20 cendoj. La laboristoj pli rapide komencis labori por povi same laborakiri. Kaj la kapitalisto post monato reduktis denove la prezon je 15 cendoj, poste 10, poste 5 cendoj. Se li estus preta starigi ĉe ĉiu laboristo unu laborpelanton, tamen tiam la laboristoj ne estus pretaj labori same tiel rapide kiel nuntempe. Ili laboras ĉiutage 10 horojn, semajne 6—7 tagojn. Kaj nun jam ne necesas laborpelanto, ĉar la laboristoj pelas sin mem en la rapidega laboro, por povi sufiĉon ricevi por vivo. Tiel sukcesis la kapitalisto treege pligrandigi la produktokvanton, kaj li bezonas nur kvaronan parton da laboristoj, kiuj tamen produktas pli ol antaŭe la triobla kvanto. Kaj du laborpelistojn li maldungis, ĉar ne plu bezonataj. Tiel ne plu rapidigas min la laborpelanto, sed devigas min rapidi sole la amaso da laboristoj, kiuj kuradas por pretigi la laboron, kaj ili produktas nune tage 40, eĉ 50 milkilogr. da lado.

Finante mian laboron vespere je la 18-a, mi estas tute laca; mi hejmen iras, purigas, manĝas, legas komunistan gazeton, poste skribas respondojn al miaj esp. korespondantoj, kiujn mi ankoraŭ havas (25—30, sed mi havis de 1922 ĝis 1929 pli ol 250). Poste mi skribas lecionojn al miaj esp. instruatoj, kaj fine mi enlitiĝas inter la 22-a kaj 23-a horoj. Kaj tiel mi dormas 6—7 horojn.

* * *

Tiel pasas unu tago post la alia ĝis la fino de l' semajno. Mi ĉiam dum tago laboris, sed de unu monato mi devas ŝanĝi la laboron. Ekzemple, lastafoje mi laboris dumnokte, kaj sabate vespere mi komencis labori je la 18-a h. kaj mi finis mian laboron dimanĉe vespere je la 18-a. Do tiel mi laboris dum 24 horoj. Ja, la tempo estis tre longa, kaj post 18-h. laboro mi estis tre laca kaj dormema, sed hejmen iri ne kuraĝis, ĉar tiam mi estus tuj forpelota. — Laborista unio en ĉi tiu ĉirkaŭo ekzistas nenia.

* * *

Dum la lastaj 2 jaroj mi elspezis por propagandaĵoj, libretoj pli ol 120 dolarojn. Sed vane estis disdonita amaso da flugfolioj: mi neniun povis varbi por esp. instruo. Tamen mi ne laciĝis. Mi pensadis, kiel mi povus akiri lernantojn. Kaj fine, je la komenco de ĉi tiu jaro, mi ekmemoris, ke mi per gazeta anonco provu akiri lernantojn. Mi anoncis, ke mi estas preta instrui esp-on al ĉiuj laboristoj senpage. Sekve de tiu alvoko anoncis sin 18 personoj. Ĉiuj ricevis de mi esp. lecionojn, poste senpagan lernolibron. El ili 8 ĉesis lerni pro diversaj motivoj, sed la restantaj jam estas progresantoj, eĉ jam korespondas. Inter ili kelkaj jam aliĝis al SAT, kaj ĉiuj certigis, ke ili aniĝos kaj abonos "S-ulon", tuj kiam ili povos legi iomete.

Do fine mi ektrovis la ilon, per kiu mi povas kaj povos akiri instruatojn; tiel miaj penadoj estas fruktodonaj, ĉar miaj fiaskoj dum 2 jaroj ne bridis mian propagandlaboremon. Sole mi ĉagreniĝis pro miaj malsukcesoj. K-doj eksterlandanoj, imitu mian metodon, kaj vi povos sukcese propagandi. Ni devas nepre superi la nunan nombron da abonantoj al "S-ulo". Mi estas certa, ke ĉiu SAT-ano povus same vigle propagandi kiel mi, ĉar verŝajne ili havas almenaŭ saman tempon kiel mi, kondiĉe ke ili volu labori, propagandi. Do komencu kaj ne ĉesu!

L. Nagy (SAT-ano 13 286).

---

esti same energie malamiko de *ĉiuj* militoj celantaj ekspluatadon k subpremon, ne nur de milito kontraŭ Sovetio. Ĉar en *ĉiuj* militoj fluas ĉefe laborista sango, ne nur en Sovetio. Socialistoj *agu* laŭ la diro: "For ĉiujn maljustajn murdojn! "Murdojn al homoj k bestoj, al kiuj lastaj ne estas eble unuiĝi kontraŭ la ekspluato. Kiel klaskonsciaj laboristoj ne nur batalas por liberigo de subpremitaj klasoj, sed ankaŭ de subpremitaj rasoj k de subpremita virina sekso, ni ankaŭ batalu kontraŭ la ekspluatado al bestoj. Helpante en tiu batalo, 'nia gazeto estu ĉiam klasbatala'."

Per tio ni fermas la diskuton pri tiu ĉi temo.

"Ĉu por aŭ kontraŭ la raciigo de l' laboro?"

Respondo al K-do 601

Mi estas por la raciigo de l' laboro, sed ne akceptas la hodiaŭajn sistemojn. La evoluo ĉien enkondukos la raciigon, k se ni forte batalas por niaj rajtoj, tiam ni povos atingi, ke en senklasa socio la homoj ne devos labori, kiel nun 8-10-12 h. potage, sed sufiĉos 4-hora labortempo. Dum tiuj 4 horoj "ĉiuj" estos okupataj, k la homoj pli racie povos vivi. Ne la maŝinoj kaŭzas la senlaborecon, sed la monavidemo de la kapitalistoj. Vi scias certe, ke estas la kapitalista taktiko, teni grandan nombron da laboristoj en senlaboreco. Per tio ili klopodas laborigi la laborantojn pli longan tempon, por pli malalta salajro. Do, kara K-do, se ni dediĉas nian karan tempon, anstataŭ disputi pri raciigo k vegetarismo (la lasta deflankigas la atenton de klasbatalo) al la organizado por klasbatalo, ni atingos pli rapide nian celon. Kaj kiam fine ni venkis la kapitalistaron, ni povos serĉi la solvojn por la transformado de l' raciigo, k ĝiaj sekvoj. Nia plej grava devo estas, instrui, organizi la laboristojn kontraŭ la ekspluatado, k akiri ilian simpation. Mia intenco estis nur konigi la situacion en Sirio, sen rimarkoj, sciante la ĝustan juĝemon de la SAT-anaro.

Malina 1453, Antverpeno.

Instruistoj! Pedagogoj!



Depost 1930 vi estu abonanto de **SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO** la nova SAT-organo por edukistoj. Detaloj sekvos

ATENTU!

Esperanto-Servo

N-o 13 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 26. Decembro 1929

EL NORVEGIO

Atenco en la vatikano

(Esperanto-Servo.) En fino de novembro okazis dum ceremonio en la "Sankta Petro-Katedralo" atenco, kies eĥo traflugis la mondon. Juna sveda flegistino, Margareta Ramstad, provis sensukcese per revolvero mortigi la katolikan episkopon de Norvegio, Smit. La motivo estis, ke li pekis kontraŭ la sesa ordono de Moseo, k ŝi, kiu opinias sin trompita, volis venĝi. Kiam ĉi tiuj linioj estas skribataj, la afero ne estas plene klarigita. Verŝajne la katolika eklezio sentas sin skuata k provas, kiel kutime, sufoki la famon de siaj voluptemaj ĉef-paŝtistoj. *102, Oslo.*

EL GERMANIO

La kondamnita eklezio

(Esperanto-Servo.) Sekvonta tre aktuala historieto okazis en la urbo Stettin. La eklezio sendis al laboristo, kiu jam delonge eliĝis el la eklezio, impostan pagpostulon. Samon tre ofte ankaŭ spertis aliaj laboristoj. Sed ĉi tiu laboristo estis ruza, li resendis la pagpostulon rekomendite kun aldonita protestletero, por eviti viziton flanke de ekzekuciisto k repostulis la afrankoespezojn (0.38 mk.). Tion kompreneble la eklezio tute ne atentis k ne respondis. Pro tio koncerna laboristo veturis per tramo al la juĝejo (al- k reveturo — 0.40 mk.) k igis juĝistan pagordonon je 0.78 mk. Ankaŭ nun la eklezio ne pagis, sed protestis. Tio kaŭzis interesan proceson. Ĉar la laboristo insistis je sia postulo, la eklezio estis kondamnita pagi la 0.78 mk. k krome la proceskostojn. Kaj vere — ĉi lastaj ne estis malgrandaj. *13 446, Stettin.*

La plej granda gazeto de l' mondo

(Esperanto-Servo.) La plej granda gazeto de l' mondo troviĝas en gazetmuzeo en urbo Aĥen. Ĝi ampleksas 260×183 cm. k aperis en la jaro 1859, kompreneble en Ameriko. Eldonkvanto estis 28 000 ekz., prezo po 8-paĝa ekz. 320 mk. Venonta numero elvenos nur en jaro 1959.

G. N. (3018), Chemnitz.

EL FRANCIO

Nova formo de socialista propagando

(Esperanto-Servo.) Jam nun oni povas certigi, ke la Franca Socialista Partio estas la unua politika organizo en la mondo, kiu sciigas, utiligi tutefike la sciencajn eltrovojn por sia propagando. La centro de tiu partio sciigis antaŭ mallonge, ke estas preparataj specialaj diskoj por fonografoj, tiuj "parolantaj maŝinoj", kiel diras ankoraŭ iuj homoj. La plej tipaj reprezentantoj k agantoj de la S. P. parolis ĉiu dum tri minutoj antaŭ speciala mikrofono k dum tiu tempo traktis la plej diversajn partojn de la socialisma doktrino. Revoluciaj kantoj estis ankaŭ envicigitaj, i. a. "La Internacio". Tiele, komence de februaro. la sama socialista oratoro povos esti aŭdata samtempe en mil laboristaj kunvenoj. Sendube granda forto por nova ideo! La francaj reakciuloj ekkomencis senti la varb-povon de tiu nova propagandrimedo; la faŝista gazeto "L'Ami du Peuple" k ĝia mastro Coty jam anoncis, ke baldaŭ li envicigos verkojn pli multnombraj ol la socialista partio. Sed ne estas certe. ke la popolamasoj tiom favore aŭskultos la faŝistajn mensogojn de Coty . . . *F. Chamarre, La Rochelle.*

EL SOVETIO

Aŭtomataj telefonoj en Rusio

(Esperanto-Servo.) Por pli raciigi k pli efiki la telefon-komunikilojn, la popola komisario por poŝto k telegrafo decidis, konstruadi meminterligantajn (aŭtomatajn) telefon-staciojn. La unua stacio jam estas konstruita en urbo Rostov/Don k jam funkcias depost aŭgusto k. j. Ĝi entenas 6000 da abonantoj. Nun oni jam komencis konstrui tiajn staciojn en Minsk, Novorossijsk, Taŝkent, Arĥangelsk, Stalingrad, Ufa k Brjansk. Unuavice ankaŭ oni intencas konstrui tiajn staciojn en Tula, Tver, Oreĥovo-Zuevo. Dum la *Kvinjaro* koncerna trusto devas produkti 175 000 aŭtomatajn telefonaparatojn. El tiu nombro dispartiĝas: Moskvo 35 000 (Moskvo jam havas 54 000 telefonojn), Leningrad 40 000, Ĥarkov 15 000, Baku 11 000, Tiflis k Odessa po 7000. Ĝenerale por konstruado de aŭtomataj telefon-stacioj oni kalkulis elspezon de 300 000 000 rubloj dum la kvinjara plano.

Fedorowsky, Kasatin.

Vulkano en naftregiono de Baku

(Esperanto-Servo.) La 24-an de novembro en Baku-a regiono, apud vilaĝo Marazy, kiu troviĝas 90 metromilojn suden de Baku, ĉe nove konstruita naftkondukilo inter Baku k Batum, ekfunkciis subite potenca vulkano. Sian naskiĝon ĝi komencis per bruego, aŭdebla multajn metromilojn ĉirkaŭe, k post la bruo aperis erupcio kun brulanta lafo, 100 metrojn ŝprucanta supren. Baku estas unu el mondaj centroj de naftindustrio k vulkano povas ege efiki la industrion en ĉi regiono. Geologoj komencis esplori la strangan fenomenon. *K. Poluŝin, Irkutsk.*

EL KANADO

Praktikadas novaj maŝinoj

(Esperanto-Servo.) Kamparanoj en Okcident-Kanado nuntempe tre okupiĝas pri aĉeto de novaj maŝinoj, kiuj samtempe falĉas k draŝas la grenojn. Ĉi jaron du fratoj uzis tutan profiton el tritiko, por novaj maŝinoj. La nova maniero, falĉi k samtempe draŝi donis tre bonajn rezultojn. *13 341, Kanado.*

La produktado de ovoj en Kanado

(Esperanto-Servo.) El registara statistiko ni povas vidi, ke en pasinta jaro oni produktis 268 868 857 dekduojn da ovoj en Kanado, kiuj valoris 84 442 727 da dolaroj. Ĉi kalkulo entenas nur kamparanan produktadon; krom tio en Kanado en urboj oni produktadas 25 000 000 dekduoj da ovoj, tiel, ke la tuta kvanto valoras 90 000 000 da dolaroj. *13 341, Kanado*

EL ANGLIO

Laboristoj kiel artistoj

(Esperanto-Servo.) Inter pentristoj, kiuj ekspozis siajn artbildojn ĉe London-a galerio, estis dudekjara senlaborulo. Mankis al li mono eĉ por aĉeti sufiĉan kanvason, k li pentris bildojn ambaŭflanke. Kvin pentraĵoj de tiu ĉi artisto estas aĉetitaj de bonjuĝuloj. Aliaj laborist-artistoj, kies pentraĵoj estas elmontritaj, estis fenestro-purigisto k helpistino ĉe bicikla butiko. Tiuj ĉi sukcesoj pruvas, ke ekzistas multaj talentoj inter la laboristaro; sed pro la fakto, ke ili havas nek monon nek okazon por disvolvigi la talenton, la mondo perdas valorajn artaĵojn . . . *12 638, Manchester.*

EL SUD-AFRIKO

Ni alportu nian kulturon . . .

(Esperanto-Servo.) La sud-afrikaj policanoj sekvas siajn usonajn kunfratojn rilate la uzadon de larm-gaso kontraŭ la indiĝenoj k laboristoj. Oni instruas ilin nun pri la plej taŭga metodo, apliki la gason, disdonante, kompreneble, gas-maskojn por protekti la aplikantojn mem. *E. K. L.*

13-a listo de raportoj en jaro 1929/30

80. Atenco en la vatikano. 102, Oslo (Norv.).
81. La kondamnita eklezio. 13 446, Stettin (Germanio).
82. La plej granda gazeto de l' mondo. G. N. (3018), Chemnitz (Germanio).
83. Nova formo de socialista propagando. F. Chamarre, La Rochelle (Francio).
84. Aŭtomataj telefonoj en Rusio. Fedorowsky, Kasatin (Sovetio).
85. Vulkano en naftregiono de Baku. K. Poluŝin, Irkutsk (Sovetio).
86. Praktikadas novaj maŝinoj. 13341 (Kanado).
87. La produktado de ovoj en Kanado. 13 341
88. Laboristoj kiel artistoj. 12 638, Manchester (Anglio).
89. Ni alportu nian kulturon . . . E. K. L. (Sud-Afriko).

TRA ESPERANTIO

Kiam niaj Gek-doj komprenos uzi laŭcele la Jarlibron de SAT?

Ni ricevis la sekvantan *proteston*, kiu devus pensigi tiujn membrojn de SAT, kiuj ekspluatis ĝis nun malbonuze nian aparaton:

"Spite la fakto, ke jam aperis en 'S-ulo' avertoj pri la misuzo de la Jarlibra adresaro, multaj membroj ĝin pruntedonas al iu ajn. Tio estas netolerebla, ĉar ĝi povas forpuŝi de nia Asocio multajn, kiuj volas eviti senĉesan tediĝon. Longatempe mi estis la sola SAT-anino en Aŭstralazio. Mi loĝas en Novzelando, tre malproksime de la kontinento Aŭstralio. Ankaŭ politikaj k. c. kondiĉoj estas tute malsimilaj en ambaŭ landoj. Okazas, ke pro manko de forto, tempo, mono mi ne povas respondi eĉ al malgranda elcento da korespondantoj. Mi dankas al ĉiuj, kiuj post anonco en "S-ulo" (sept. 1928) sin detenis. Mi ricevis sennombrajn informpetojn 1. pri oficado en hotelo; 2. pri infanaj libroj por knabineto; 3. pri cirko en Melbörn (Melburne); 4. pri poŝtmarkoj, ilustr. PK, gazetoj, detalaj artikoloj ktp. Mi bedaŭras, ke ne ĉiam mi respondis al organizoj, kvankam mi klopodis kaj klopodos ĉiam fari tion por grandaj lab. organizoj. Sed en tiu ĉi urbo estas nenia esp. kurso aŭ klubo. — Mary M. Carthy (7373). Dunedin."

Ĉu vi, Gek-doj, komprenas la situacion de tiu SAT-membro? Kaj ĉu vi malgraŭ tio daŭrigos misuzi la Jarlibran adresaron? Ĉu vi ne vidas, ke de tiu afero dependas la reputacio de SAT, ĝia fidindo kaj seriozo, eĉ ĝia estonta disvolviĝo? Ke ni per tia malserioza agado perdos multajn, kiuj estas forpuŝataj, ĉagrenitaj, teditaj kiel ĉi supra K-dino? Niaj aktivuloj en ĉiuj lokoj, precipe niaj Perantoj, direktu sian atenton al tiu demando kaj priparolu ĝin en la kunvenoj; ĝi estas parto de nia eduka taskaro. Ĉe la varbado de novaj membroj vi atentu kaj atentigu, vi klarigu, kion celas nia organizo, kia estas ĝia interhelpa karaktero kaj kio nepre devas malaperi el niaj vicoj, ĉar ĝi frivole malutilegas nian aferon.

Konkrete: necesas, ke 1. ĉiu SAT-ano nepre citu sian matrikulon en ĉiu sia korespondaĵo; 2. ĉe personaj renkontiĝoj kun ĝis nun nekonataj esp-istoj la K-doj montrigu al si la membrokarton; 3. ili ne pruntu sian Jarlibron al iuj nemembroj, kiuj uzas ĝin por celoj nekonataj, 4. por atingi kontentigan rezulton, en la intereso de nia movado, ĉiuj aktivaj membroj, varbantoj estas alvokataj atenti pri tiaj misuzoj kaj nepre kontraŭbatali ilin. Pridiskutu en la grupoj kaj rondoj tiun temon! Ĉiu devas kompreni la gravon de tiu fenomeno por nia organizo!

Direkcio de SAT.

Ni ankoraŭ ne atingis staton de 4000 abonantoj!

Tamen okazis la pligrandigo de „S-ulo" siatempe nur je la kondiĉo, ke la legantaro plimultiĝu ĝis 4000. Tiu kondiĉo plenumita ne estas. Nia "financministro" timegas pro la deficito. Sekve estas antaŭvideble, ke ni devos malantaŭenpaŝi. Ĉu vi permesos tion?

Ĉu vere en nia movado ne troviĝas almenaŭ 4000 anoj konsciaj, pretaj certigi al "S-ulo" per sia abono regulajn 12-paĝajn n-ojn?

URĜEGAS RESPONDO!

"Respondo garantiata!"

Per tia multpromesa diro preskaŭ ĉiu anonco por havigi ioman kvanton da korespondantoj allogas multajn korespondemulojn el ĉiuj partoj de la mondo. Sed la promeso estas tiomfoje rompata, kiom ĝi estas donata, kaj rezulto el tio estas ĉiam, ke la novaj korespondemuloj perdas la emon kaj kuraĝon daŭrigi la provojn, trovi korespondeman K-don. Per tia agado oni nur atingas jenajn rezultojn: 1. estas fortimigataj la novaj K-doj, serĉantaj unuafoje eksterlandan interligon; 2. oni perdas la eblon trovi novajn abonantojn por niaj gazetoj, se lernintoj ne vidos, ke ilia studado valoras; 3. oni kreskigos la supozon, esp-a lingvo estas ne sufiĉe disvastigita; 4. oni nuligas nian Statuton, kiu diras, ke per la helpo de SAT oni povas atingi vastegan interligon inter la K-doj el ĉiuj landoj.

Sume, tiuj ĉi K-doj agas ne kiel konsciaj proletoj, ne kiel veraj SAT-anoj!

Do, K-doj, kiu ne plenumis ĝis nun la promeson respondi al alvenintaj skribaĵoj, faru vian devon, montru ke viaj promesoj ne estas senvaloraj diroj, sed paroloj de homo, kiu konas sian taskon!

Vi ja scias, K-doj korespondantaj, ke plendo neniam venas unuope. Tiun kutimon mi ne volas forigi, pro tio mi metas antaŭ vin alian aferon priplendindan: Mi mem ofte spertas, ke niaj K-doj tuj ĉesigas la ĵus komencitan korespondadon, kiam ili sciiĝas, ke iu ne preĝas al la sama politika doktrino aŭ dogmo kiel ili mem. Multaj K-doj postulas de aliaj toleremon kaj indulgon por siaj pensoj, eĉ se tiuj al aliaj evidente ne plaĉas; sed ili neniam pensis pri tio, ke aliaj povus postuli la samon kiel tiu netolerema homo. Multaj K-doj kredas neinda por ili korespondi kun K-do havanta alian opinion ol ili mem. Ili volas korespondi en ĉiuj cirkonstancoj nur kun sampartianoj, ili nomas tian agon klaskonscia kaj ne rimarkas, kiajn interesajn korespondeblojn ili ellasas. Laŭ mia opinio oni restas vigla en penso nur, se oni sin okupas ankaŭ pri la ideario de alipensanto. Kompreneble estas antaŭkondiĉo, ke oni povas toleri la dirojn de alia K-do ankaŭ tiam, kiam ili ne plaĉas al ni. Kiu posedas tian econ, tiu nepre provu ekkorespondi kun alipartiaj K-doj kaj mi estas konvinkita, ke vi neniam ĉesigos ĝin. Agante tiel ni kondukos en niajn vicojn veran interkomprenon; oni sukcesos interfratigi ĉiujn niajn K-dojn malgraŭ la diferencaj pensoj, malgraŭ la malsama vojo, por la bono de niaj celoj kaj nia organizo — SAT!

Willi Bennewitz (2378).

10-a KONGRESO DE SAT en Londono (Britio), 3.—7. aŭg. 1930

1-a Komuniko

Organiza Kongres-Komitato. La Komitato estas elektita de la Londonaj SAT-anoj k konsistas el jenaj K-doj:
F. Sons, prezidanto,
H. Cohen, kasisto,
J. Sulsky, sekretario, 19, Leyton Rd., *Harpenden*, Herts, kaj unu delegito de ĉiu Sub-komitato.

Kongresaliĝoj. Per la sama n-o de "S-ulo" ni dissendas la aliĝilojn. La dissendo okazas jam nun, por instigi plej multajn Gek-dojn aliĝi k laŭeble partopreni la Kongreson. Detalojn legu sur la aliĝilo mem.

Kongresejo. Ĉiuj kongresaj kunsidoj okazos en la *Conway Hall*, kiu estas lokita en la centro de Londono. La bonvenaj kaj propagandaj manifestacioj okazos en aliaj lokoj. Program-detaloj sekvos.

Kongreskotizo. La kongreskotizo estas fiksita same kiel ĉe la antaŭaj Kongresoj, t. e. je egalvaloro de la jara SAT-kotizo.

Ni esperas, ke granda nombro da SAT-anoj aliĝos la Kongreson k pagos la kotizon, kvankam ili eble ne sukcesos veni al Londono.

Laborkunsidoj komenciĝos je la 4-a de aŭgusto.

Kongresadreso. Ĉio, kio rilatas la Kongreson (aliĝiloj, monsumoj, informpetoj) estu sendata al unu sama adreso: K-do J. Sulsky, 19, Leyton Rd., *Harpenden*, Herts.

Gek-doj, subtenu la Jubilean Kongreson de SAT! *O. K. K.*

ESPERANTO ĈE LA LEIPZIG-AJ FERVOJISTOJ

Ne nur post la 9. SAT-Kongreso, sed jam antaŭe regis simpatio por esp-o inter la Leipzig-aj fervojistoj k sindikato. Tamen ĉe multaj, precipe inter subaj oficistoj, pro la nuntempa labortempo, vivteno ktp. k pro ne-oficiala akcepto de esp-o ĉe la administracio ekzistas malmulte da simpatio eklerni la lingvon. La varbado inter altranguloj estas eĉ pli malfacila, ĉar laŭ tradicio kelkaj lernis anglan k francan lingvojn. Sed ekzistas kolegoj, kiuj malgraŭ longa, malregula deĵoro lernas en kursoj de sindikato aŭ alia rondo esp-on, kun la nura praktika celo, konsulti, informi homojn, interŝanĝi opiniojn. La ĝisnunaj provoj instigi la administracion por aranĝo de oficialaj kursoj, kiel en kelkaj landoj, ne sukcesis. Tamen la administracio disponigas ĉambron, lumon ktp. por fervojistaj esp. kursoj, se ili okazas en la stacidomo. Ekzemple la kursanoj de kolego Volf (Wolf) ricevis senpagan kursĉambron de l' administracio. Estas 13 p., kiuj ne regule ĉiuj povas ĉeesti pro la deĵorkondiĉoj. K-do *Rödel* instruas en la var-ekspedejo Leipzig-Varen (Wahren) kun helpo de alia K-do pli ol 30 fervojistojn dum la laborpaŭzo. En Paŭnsdorfa var-stacio komenciĝis fine de nov. kurso kun 20 p. La ĝisnunaj rezultoj inter Leipzig-aj fervojistoj estas kontentigaj, sed estsu pli bone, se ankaŭ en aliaj regionoj egalproporcie la fervojistoj okupus sin pri esp-o, por respondi al la postuloj de nia tempo.

M. Häckel (1162).

ESPERANTO KAJ FERVOJISTOJ

Esperantista movado pli k pli disvastiĝas en fervojistaj rondoj. Izolaj fervojistoj dissemitaj en malgrandaj stacioj nuntempe estas preskaŭ solaj pioniroj de nia movado en ĉi tiuj "ursaj" anguletoj. Ili laboras, sed por ilia laboro mankas komuna sperto, reciproka interhelpo. Mankas profesia gazeto, en kiu oni povus ekscii pri la vivkondiĉoj de siaj K-doj, pri sociaj rajtoj de tutmonda fervojistaro. pri teknikaj inventoj, pri praktika apliko de esp-o en fervojoj. Necesas fervoja terminaro. Ni bezonas nian profesian gazeton. La ekzistanta "La Fervojisto" aperas malregule k ne tute kontentigas ĉiujn. Estas dezirate havi "fervojistan paĝon" en "S-ulo" aŭ fervojistan suplementon al "S-ulo".

La demando estas urĝa k grava. Skribu viajn konsiderojn, konsilojn, proponojn k. a. laŭ adreso: Sovetio. stacio *Popovka,* Leningrada regiono, Sovetskij pr. n. 1. *P. Soroko* (2081). (Je nomo de fervojista sekcio de SEU.

"NE FORGESU, KE VI ESTAS SAT-ANOJ!"

Per ĉi tiu noteto mi volas fari konkludon el sperto okaze de la vizito de eksterlandaj laboristaj delegitaroj al USSR dum la datreveno de l' Oktobra revolucio. En la areto de ĉiu delegitaro oni povis trovi SAT-anon aŭ ĝenerale esp-iston. Sed ĉiuj Gek-doj *ne* utiligis sian eblon agiti ĉe la sovetia laboristaro por esp-o. Ĉie, kie ili vojaĝis, ili interparolis kun sov. Gek-doj per tradukisto, kiu sciis ilian nacian lingvon. Neniu salutparolo en esp-o. Tiel bedaŭrinde la sovetiaj esp-istoj perdis bonan okazon atentigi pri nia lingvo. Al mi ŝajnas, ke tiuj K-doj malatentis sian devon, kiu estas ĉie k ĉiam alvoki per signaldiro: Proletoj de la tuta mondo lernu esp-on!

Solodovnikov.

GERMANIAJ ABONANTOJ

ATENTU

Ekde 1. januaro 1930 "S-ulo" por vi estas ankaŭ abonebla per ĉiu poŝtejo en Germanio. La prezo estas monate 0,75 mk.g. Ni rekomendas al vi ĉi tiun procedon, ĉar per tio interrompo en la liverado ne povas okazi; la poŝtisto mem enkasigas la abonmonon.

Membroj, kiuj rekte abonas "S-ulo"-n ĉe la Adm., dum almenaŭ duona jaro, same ricevos la gazeton per la gazetekspedejo de nia poŝtoficejo. Adm.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

BELGIO. Antverpeno. La grupo el maristoj havas nun 20 membrojn, el kiuj 17 estas SAT-anoj. Nia propagando estas vigla, sed tre malfacila. ĉar ni povas labori nur, kiam ni estas sur bordo kelkajn semajnojn. Pordisto k unu kelnero de l' Marista Hejmo nun instruiĝas. La lab. esp. movado loka (grupo "Nia Ideo") estas tre malforta k pasiva; ĝin klopodas vivigi nur unu aktivulo (K-do Mortier). — *ĈEĤOSLOVAKIO. Stonava.* 1. XII. okazis kunveno de regiona lab. esp. sekcio: ĉeestis 17 K-doj (7 SAT-anoj) el 7 lokoj. Oni pridiskutis venontan propagandon k elektis komitaton por plivigligi laboron inter sileziaj esp-istoj. (8139.) — *GERMANIO. Chemnitz.* Lastatempe malfermiĝis 5 novaj kursoj (1 en elektra fabriko). Soc. junularo fondis instituton por uzi esp-on en servo de l' soc. jun., ĉefe por akiri indiv. k grupan koresp. kun eksterl. soc. junularo. Urba klerigkomitato aranĝis 12. XII. publikan paroladon en esp-o (Oratoro: prof. Wicke). Esp. urbgvidilo preskaŭ elĉerpiĝis. Interesiĝantoj mendu senpage novan eldonon ĉe *Verkehrsverein,* Chemnitz, Jakobikirchplatz. Vizitis nin k publike parolis K-do Lundgreen, Svedio. Loka lab. gazetaro ofte publikigas peresp. salutojn k leterojn. — "Arb. Esperantist" anoncas novajn LEA-grupojn en Dorfchemnitz k Landsweiler (Saar). La distrikto Ercgebirge - Vogtland (Saksio) plendas pri malbonaj rezultoj de grandega publika propagando (kulpo: la tro-organizo, tro multaj aranĝoj de plej div. unuiĝoj k klerig-institutoj). Same en *Halle* k *Kassel* la propagando ne donis la deziritajn sukcesojn. En *Augsburg* 4 kursoj kun 100 p. (inter ili 1 ĉe soc. junularo, 1 ĉe infanamikoj). — *Sovetio. Kiev.* En viandindustria faklernejo kurso kun 37 p. Gvidas K-do Poljakin (15 221) laŭ "Svistunov". En *Kohma (Ivanova* Industria regiono) organiziĝis kurso kun 20 p. ĉe Klubo de linfabrikoj (2. 11.). En Granda Klubo urba (je nomo Semenĉikov) 2-jaraj kursoj kun 35 p. Dum oktobra festo esp-istoj partoprenis la aranĝojn; en kunvenoj estis legata salutlet. el Essen. *Nikolaev.* Komence de 1929 funkciis kursoj ĉe fabriko "Marti", centra met. klubo je Sverdlov, Domo de lab. geknaboj, prof.-tekn. lernejo (konstr.) 27. IV. okazis en Domo de Klerigo intern. propag. vespero, kiun partoprenis 800 p. (kun ekspozicio). Leteroj el Aŭstrio k Bavario estis ekspozataj, ankaŭ radio-disaŭdigataj. K-doj Noskin k Belogorcev rap. pri signifo de esp-o por lab. intern. edukado. Nun funkcias 3 kursoj ĉe Sovpartia lernejo (80 p.), ĉe junulara distr. kom. Konsultejo organizota k Interliga Oficejo. Supera kurso preparas kursgvidantojn mankantajn. Partio k junularo favore rilatas al nia laboro. (7495.) *Sebastopolo.* Dank' al larĝe disvolvita peresp-a koresp. esp-o fariĝis ne nur treege populara inter lab. rondoj, sed ĝin oficiale subtenas, partia komitato, de sindikatoj, redakcio div. prof. k sov. organizoj. Korespondoficejo "Lab.-esko" funkcias nun kiel oficiala fako de loka ĵurnalo "Majak Kommuni", ligiĝis kun lab. koresp-antoj de 20 landoj, kiuj provizas por nia ĵurnalo konstantan, tre valoran materialon. Ĉiusemajne aperas regule tuta *folio* da peresp-a materialo. Eĉ la kapoj de la ĵurnalo estas esperantlingvaj. Labesko interligis preskaŭ ĉiujn gravajn organizojn k junkom. ĉelojn kun eksterlandaj lab-istoj. Soveto de sindikato rezoluciis, ke ĉiuj kluboj fabrikaj devas malfermi esp. kursojn k popularigi intern. interligon. Ĉiujn kursojn pagu la fabrikkomitatoj. Ĉe Redakcio funkcias kurso por labkoroj k rajtigitoj por intern. interligo. Ĉe fabriko de trikistinoj ĉiuj laboristinoj enskribiĝis por kurso. Tre vigle laboras esp. sekcio ĉe Soveto de sendiuloj. Lastjare estas presitaj en "Majak Kommuni": 93 leteroj, 31 artikoloj, multege da notoj per- k poresp-aj. En "Ruĝa Nigramarulo" 88 leteroj, 12 artikoloj; en "Ruĝa Krimeo" — 11 leteroj k 3 artikoloj. Sume en "Majak Kommuni" aperis 258 leteroj 63 artikoloj. Ekspozicio de Labesko dum

la tutkrimea konferenco de labkoroj faris grandegan impreson k estis kvalifikita en la ĵurnalo kiel "Perlo de la ekspozicio". Memkompreneble plej grandan sukceson ni ŝuldas al niaj fervoraj koresp-antoj, al kiuj ni dankas ĉi-loke. Ne la poresp-a propagando, sed la peresp-a laboro garantias sukceson al nia movado. (I. Lisiĉnık.)

ĈE LA NEŬTRALULOJ

Sukcesaj Ĉe-kursoj

Andreo Ĉe faris en Tallinn (Estonio) antaŭe per multspeca reklamo bone preparitan kurson (kiun rekomendis ekz. Urba Lerneja Admin. k Instruista Societo). Provlecionon vizitis ĉ. 500 p., kurson (4-foje semajne) pli ol 200 p. (en du grupoj). Plej multaj estis gelernantoj, sed plie oficistoj, instruistoj k komercistoj. Ankaŭ en aliaj estoniaj urboj samtempe okazis kursoj laŭ Ĉe-metodo kun granda nombro da partoprenantoj.

Poste Ĉe vojaĝis al Nederlando, kie li komencis instrui en Roterdamo (sekve de lekcio renaskiĝis mortinta unuiĝo). En Dordreħt 125 lern., en Hago pli ol 200, same en Amsterdam.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

E. Drezen, Zamenhof. Originalo. 49 pĝ. Form. 12×17 cm. Prezo: 0.70 mk. g. SAT-eldono. 1929. Adm. de SAT, Kolmstr. 1, *Leipzig O 27.*

Necesis tiu verko en SAT-biblioteko. K-do Drezen prezentas ĉion necesan pri modesta kaj genia Zamenhof, lokas lin ekzakte en lia tempo kaj medio. Je 70-jara naskiĝdato de Zamenhof (1859—1917), SAT eldonas tiun libron.

Anstataŭ kiel burĝaj libroj, en kiuj laŭdo nur konas religiajn formojn, flatemon, diigon de famuloj (por stultigi amasojn kaj ĵeti ilin en timeman respekton), tiu verko de Drezen klare informas SAT-anojn pri ecoj kaj pensmaniero de Zamenhof.

Drezen diskutas kun Zamenhof, kaj tio estas tre interesa. Zamenhof kredis, ke estus sufiĉa malamigi militon, interfratigi homojn per esp-o kaj "Homaranismo", por krei pacon. Li tion kredis . . . kaj dubis pri tio, sufiĉe klere, profunde konante homojn kaj iliajn frenezojn, montras Drezen.

Drezen kontraŭopinias, ke eĉ se ĉiuj dezirus pacon, socia paco ne estas ebla tiom longe, kiom daŭras kapitalismo. Li en tio tute pravas. — Kaj li kontraŭopinias ankaŭ, ke paco inter nacioj neeblas, tiom longe, kiom daŭras naciaj kapitalismoj. Li sufiĉe pravas, sed . . .

Sed ni rimarku, ke kapitalismo fariĝas sennacia nun. Nur *pasioj, superstiĉoj, reakcia pensmaniero: sentoj,* klopodus *enfermi* kapitalismon *en nacio.* Trustoj, vivo, rompas tiujn naciajn limojn de ekonomio. Revoluciularo baldaŭ ne plu luktos kontraŭ naciismaj kapitalismoj, sed kontraŭ unu sola sennacia kapitalismo, se revolucioj ne fariĝos antaŭe.

Do *nacia kapitalismo* estas nur *sento,* kiu daŭras ankoraŭ, kiam la faktoj jam starigas mondan unuiĝan kapitalismon. Sekve, se naskiĝus milito, *nun,* inter kapitalismaj nacioj, *nur sentoj, ne interesoj* (aŭ tute *pasiaj interesoj),* estus kulpaj en tiu milito. Estus la stulta militisto, kiu sukcesus naski militon, *kvankam la trustaro jam ne plu bezonas tiun militon.*

Ekzemple, ĉu pola kapitalismo estas fakto? Ne. Ĝi estas nur pasia deziro, idealismo de kelkaj iluziaj poloj. Reale, tre malfacile kuniĝas antaŭmilitaj germana industrio en Poznanio, aŭstra industrio en Galicio kun kamparanaro de Varsovia Polio. Reale, polaj industrioj apartenas al *usonaj,* francaj, anglaj, germanaj trustistoj. Tamen, Polio estas proporcie la plej militista nacio *nune,* kvankam ĝi ne posedas nacian kapitalismon. Do pasioj, superstiĉoj, "idealismoj" ankoraŭ preparas militojn, dum historia materialismo: *sennaciiĝo de kapitalismo,* jam ne plu pravigas tiajn militojn.

Tial Zamenhof ankaŭ *iom pravis,* kiam li opiniis, ke detrui *sentojn* militistajn, malamojn ebligas pacon. Se malamoj malaperos, militoj inter kapitalismoj estos for.

Kapitalismoj kuniĝos, nur Sovetion minacante. Sed ili neniam kuraĝos ekataki Sovetion. Jam burĝaro nur deziras profiti, ĝui tiom, kiom daŭros kapitalismo kaj submetiĝo de laboristoj kaj kampkulturistoj. Tion laboristaro ne sufiĉe rimarkas. Burĝaro ne plu kredas je si mem. Kleriĝo de laboristaro kaj homaro ĉiam pli kaj pli malfortigos estrojn de kapitalo, kiuj ne plu povos agi grandskale. Ili nur profitos, profitados tiom longe, kiom leĝoj permesos al ili profiti. Faŝismo estas la febro de ilia malsana korpo. En tiu "kapitalisma paco" fariĝos revolucioj en diversaj landoj, eble rapide en ĉiuj landoj sinsekve.

Por prepari tion, metodo de Zamenhof detrui reakciajn sentojn, superstiĉojn (kaj esp-o grandege helpas tion inter amasoj, dum partioj pli politike agas), estas *ankaŭ bona.* Tion montris Drezen mem, kvankam, iafoje, li tro simple kontraŭas tielnomatan "burĝan idealismon", "etburĝan oportunismon", per tro simpla "historia materialismo", modaj frazetoj, kiuj rapide velkos, kiel velkas modaj kantetoj.

Drezen-aj analizoj pri karaktero de Zamenhof kaj la eltranĉoj el Zamenhofa verkaro estas bonegaj. Ni nun povos ekkoni Zamenhof ne bezonante foliumi la naŭzajn kompliment-verkojn de burĝoj, kiuj nur scipovas aŭ malami, aŭ piedojn kisi.

Ni trovis sufiĉe multajn preseraroj: p. 8 sentime (anst. senlime), farpasas (anst. for-), 9 pezentita (prezentita), 14 pukto (punkto), 24 nu (nur), 29 ataŭirintoj (antaŭ-), 35 pfofunde (profunde), 34 kojektante (konjektante), 45 Zamenhoi (-hof), 47 ankaraŭ, maltortaj (ankoraŭ, malfortaj), 48 heredontan (heredonton), uniĝintaj (unuiĝintaj). Krome ni notis ankaŭ jenajn gramatikajn, lingvajn erarojn: pĝ. 6 "en la 1907" (anŝt. en la jaro aŭ en 1907), 8 kiel pioniro, profeto (anst. pioniro*n*, profeto*n*), 10 tia grado . . . kiam (anst. ke), 13 kompreno por (anst. pri), 17 konvinkige (anst. konvinke), 27 studinta (anst. studinte), 44 entuziastaj (anst. entuziasmaj), 46 kieł kompetentaj (anst. kompetentaj*n*); diversloke mankas la difinita artikolo, kiam necesa.

Jief.

NIA POŜTO

Jos. Mateu. — Via informo havas nur lokan signifon k sekve ne povas interesi nian tutmondan legantaron. Tiajn informojn sendu al F. E. O.

5466. — Aperos *certe* "Por proleta sano", *eble* "Buĝeto", sed *ne* via tria manuskripto. *Red.*

14 571. — Via unua artikoleto prokrastiĝis, sed aperos. Ankaŭ la dua.

13 066. — Polemiko persona inter vi k K-do B. certe ne povas interesi niajn legantojn. Sekve, ni ne publikigos. *E. L.*

F. Seidl. — Via artikolo estas bone verkita, sed ni jam publikigis pri la sama temo sufiĉe multajn artikolojn lastatempe. Tial ni ne povas enmeti la vian.

6771. — Pri Turkmenio aperis jam kelkaj artikoloj en "S-ulo". Ni tial uzos vian manuskripton nur en okazo de bezono.

13 293. — Pro ĝia nelegeblo ni ne sukcesis kompreni la veran sencon de via artikolo; ni tamen emas pensi, ke vi mem ne komprenis la artikolon, al kiu vi celis respondi.

Korekto. En n-o 271, pĝ. 131, 1-a kol., lin. 36 de supre, anstataŭigu "k ankaŭ" per simpla; "k sampaĝe", 2-a kol., lin. 3 de supre legu, anstataŭ "akurate" — "samlitere".

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-ajo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Franz Ŝmidt, Matznerstr. 15/6, *Wien 13,* kĉl., krom Sovetio k Germanio, L, PI, resp. garantiata.

K-do Fred. Scheithauer, Wattgasse 65, *Wien 16,* kĉl., L, PK, PI. Resp. gar.

BRITIO

Adresŝanĝo. — K-do J. Barry nun loĝas: 24 Whitefriars Avenue, *Wealdstone,* Middlesex. Interŝ. librojn.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Richard Wenzel, *Langenau Nr. 152,* ap. Böhm.-Leipa, kĉl., PI, PM. Resp. garantiata.

GERMANIO

K-do Fritz Rauner, Gartenstr. 13, *Röderau i. Sa.,* kĉl., pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do K. Zschuckelt, Langestr. 14, *Riesa-Weida i. Sa.* (maŝinisto), kĉl., krom Sovetio, pri ĉ. temoj. Resp. gar.

Atentu! — Kiu dez. koresp. kun natur-amika esp. grupo pri sporto, ekonomio k politikaj temoj? Adr.: Kurt Lischke, Goedekestr. 19, *Döllnitz* (Saalkr.). Resp. certe.

— Berlinaj Gekursanoj dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj L, PK, PI, certe resp. Adreso: Laborista Esperanto-Asocio, Jugendheim, Litauer Str. 18, *Berlin O 34.*

— Du K-doj serĉas koresp-adon kĉl., pref. kun kompostistoj en Japanio, Ĉinio. Certe resp. Adr.: Walter Hildebrandt, Bismarckstr. 39, *Waltershausen i. Th.*

— Grupo el 15 Gek-doj (parte lernantoj) dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj L, PK, PI. Resp. garantiata. Adr.: Rud. Jelinek, Kl. Plauensche Str. 6, I, S. 3, *Dresden-A. 1.*

K-do Herbert Thiele, Reckestr. 4/3, *Dresden-A. 27,* kĉl., pri ĉ. temoj, L, PI Resp. garantiata.

Filatelistoj! — K-do F. Richter, Geilenkirchener Str. 425, *Streiffeld b. Aachen,* interŝ. 100 div. germ. PM. kontraŭ sama kvanto de a. l.

— Germ. junulara ĉelo k gepioniroj koresp. kĉl. k ĉeloj, il. jurnal. Resp garantiata. Adr.: Reinhold Höhne. Freiheitsstr. 67, *Merkstein-Streiffeld.* Kr. Aachen.

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

HISPANIO

K-do Fco. Montaner, str. Mayor 139 (C. A.), *Sabadell,* kĉl., pri ĉ. t.

KANADO

K-do E. Jakŝtis, Bellwoods Ave. 133, *W. Toronto,* Ont., petas siajn gekor-esp-antojn pacienciĝi, malfruan resp. kaŭzis la transkanada vojaĝo.

NEDERLANDO

K-do A. Monnikkentam, Therese Schartjeplein 21, H., *Amsterdam,* kĉl. Resp. garantiata.

FOTOJ Nova, angla, laborista ĉiusemajna, ilustrita gazeto
Al ĉiuj Gek-doj de Esperantio! "W-I-N"

La redaktoro dez. ricevi fotojn, kiuj ilustras ĉiujn flankojn de la laboristara vivo (bataloj, laborkondiĉoj, kulturoj, sportoj, progresoj ktp. Ĉi tiu ĵurnalo simpatias al nia SAT-movado k de la 2-a numero enhavos esp.-

Gek-doj, subtenu "W-I-N", la solan anglan lab. ilustritan gazeton abone. Ĉiujara abono 13 ŝ. (14 mk. g.)

Adreso:
"W-I-N", 91 Grays Inn Road, London W. C. 1

SOVETIO

Atentu! — Ivanova industria landa junkom. gazeto *"Leninec"* (Leninano) bone uzas esp. materialon en ĉ. n-oj estas enmetitaj ricevitaj peresp. k priesp. artikoloj. Nuntempe stariĝis ĉe redakcio esp. rondeto. Se legantoj dezirus pergaz. koresp. kurson esp. ni povas komenci. K-doj multnombre skribu al: Ivanovo-Voznesensk, Miĥajlovskaja 13, Red. "Leninec".

K-do Georgo Ŝevĉuk, Telegrafejo, *Sretensk,* Ekstrem-Oriento, kĉl., precipe kun Usono k Germanio.

K-do Bazilo Kalaĉev (studento), ŝipkonstruisto), Pr. Karl Marks 90 b, 3, *Leningrad,* kun gestudento ĉl. pri stud. vivo, laboro k. a. temoj.

— Virina kolektivo de kontraŭalkohola ĉelo koresp. pri kontraŭalkohola batalo en ĉ. l. Resp. gar. *Leningrad,* ul. Vosstania, 45, kontraŭalkohola ĉelo.

K-do Mikaelo Laĥov, *Leningrad 15,* Sovetskij pr., 32-b, LVŜS, kĉl. pri ĉ. t.

K-do Eŭgeno Bilĉinskij, *Leningrad,* ul. Skoroĥodova, 25, kv. 38, kĉl. pri sociaj k politikaj temoj k interŝ. gaz. ĵurn.

K-dino Serafima Naĥimoviĉ, *Leningrad,* ul. Ryleeva, 10, kv. 36, kĉl., pri pedagogiaj, lit., soc., sciencaj temoj.

K-dino A. Prank, *Volĥovstroj,* 6 elektra stacio, pri ĉ. t. kun ĉl. Certe respondos.

— Leningradaj tramistoj koresp. kun ĉ. l. samprofesianoj laŭ adresoj: *Leningrad,* Degtjarnij per. 3-a, mestkom. aŭ al K-do N. Doroseviĉ, str. de Teksistoj, 27, kv. 9, Leningrad, 29.

— Marista Esperantista rondeto koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Resp. gar. *Leningrad,* Vas. Ostr., nab. Ŝmidta, 17, VMUF, kruĵok Esperanto.

— *Kiu volas kolektive korespondi?* Pri 1. tekniko, 2. politiko, 3. ateismo, 4. laborista k virina movado, 5. junkomunista movado, 6. partia k sindikata vivo, sporto ktp. Tuj skribu: *Leningrad,* Sovetio, Vybor, St. Klubo ĉe uzino je la nomo K. Marks, al esper. rondeto.

K-do Leonido Mitrofanov, *Leningrad,* Ŝuvalovo, ul. Ŝuvalovo, 14, pri sportmovado k ĉ. t. kĉl.

NI VOLAS

koresp. kun pioniroj k kun lernantoj pri infana vivo k. a. temoj. Ni tuj resp. Adr.: *Gomel* (Sovetio), Pervomajskaja, ul. 18 al K-do Civlin (por 11-a pionirtaĉmento).

Kiu helpos al ni? 15.—31. dec.

nia hejmlaborista klubo aranĝas ekspozicion pri internacia korespondado (okazos ankaŭ diskuto pri esperanto). — Sendu: L, PK (pri IRH, vivo de laboristoj ktp.), PI, gazetojn, fotografaĵojn, insignojn k. a. aĵojn! Certe resp. Adr.: K-do A. Indman (por la klubo "Emes"), Kaljajeva str. n-o 30. *Gomel,* Sovetio.

SALUTOJN SENDU

al la nova "Daily Worker" ĉiutaga komunista ĵurnalo, kiu aperos la 1-an de jan. 1930. Adresu: "Daily Worker, 16 King St., *London W. C. 1.* (Britio).

120 ESTONOJ

II diversprofesiaj esp-istoj deziras koresp. kun vi individue. Sendu ankaŭ amase esp-an agitmaterialon, salutleterojn, PK, ĵurn. ktp. ĝis la 20. dec. Adreso: Lab. Esperanto Klubo *Pärnu* (Estonio).

ENHAVO:

	paĝo
Pri negraj lingvoj kaj literaturo	145—146
Ferindustrio en URSS	146
Paco sur tero!	147
Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)	147—148
Malŝatu la naciajn lingvojn!	148
El Usona taglibro	148
Rekord-rikolto de teo	148
Sennaciula Virina Paĝo	149
Diskutejo	150—151
Tago el la vivo de laboristo en Usono	151
Esperanto-Servo	152
Tra Esperantio	153—155
Korespondado, Anoncoj	156

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)